

[noto] eldonita de Nisida Ryôya 西田亮哉, privata eldono, 1937

el la japana tradukis Nisida Ryôya

originalo: Isii Mamine 石井眞峰 "A short life of Hônen 法然上人略傳"

LA VIVO DE SANKTA HÔNEN

ANTAŬPAROLO DE LA TRADUKINTO

Antaŭ ĉio mi esprimas koran dankon al Sinjoro Profesoro Isii-Mamine M. A., kiu volonte permesis al mi traduki Esperanten lian verkon "A short life of Hônen (法然上人略傳)" eldonitan de Kyôgaku-syûhō-Sya, Siba, Tokio, 1932, okaze de la 800-jara jubileo de la naskiĝo de Sankta Hônen.

Mi kore dankas ankaŭ al S-ro Kawasaki-Naokazu, membro de la Lingva Komitato, kiu afable korektis erarojn kaj nebonajn esprimojn en mia manuskripto. Mi ne povas forgesi lin rilate al Esperanto, ĉar li estis mia unuafoja instruanto de Esperanto, kiam mi ankoraŭ estis gimnaziano ĝuste antaŭ dek jaroj.

Se la Esperanto de mia tradukaĵo estas bonstila, tion mi multe ŝuldas al Sinjorinoj Elisabeth Feigenbutz kaj E. A. Frielink Nales kaj Fraŭlino Emmy Thiel. Mi dediĉas sinceran dankon al tiuj eksterlandaj samideaninoj.

Tiun ĉi tradukaĵon mi ne deziras prezenti al ateistoj, ĉar mi scias, ke por ili religio estas kvazaŭ diamanto apud porko, sed prezenti al tiuj, kiuj kredas Dion kaj la Paradizon, ĉar ili bone komprenus, ke la Vero ĉiam kaj ĉie ekzistas, ne demandante historian malproksimecon, nek geografian distancon.

La originala teksto ne havas bildon, nek preparan ĉapitron, nek noton pri propraj nomoj kaj Budhismaj terminoj, tial mi aldonis ilin, por ke legantoj facile komprenu la enhavon. Tamen mi mem rimarkas, ke por tiuj, kiuj havas emon studi pli profunde Budhismon, tiu noto aldonita estus tro simpla por esti kompleta. Sed tio estis neevitebla, ĉar ne tie estas loko por skribi pri altgrada teorio.

Por ni estas memorinda afero, ke la granda ceremonio de la 700-jara datreveno de la mortoj de Tinzei aŭ Syôkô aŭ Daisyôsyôdyu-*Kokusi* (ŝtata instruisto, unu el la plej honoraj titoloj, postmorte nomataj de Imperiestro), la dua patriarko de Zyôdo-sekto, kaj de Seikwanbô-Genti-Syônin, la dua estro de Templo Tion-in, kaj la 650-jara datreveno de la morto de Kisyu-Zendi, la tria patriarko de Zyôdo-sekto, estas okazonta ĉe Templo Tion-in en antikva florĉefurbo Kioto printempe en tiu ĉi jaro. Samtempe ni ne forgesu ilian spiriton, kiu devenis de Sankta Hônen; ili entuziasme rekomendadis al ni nur la praktikon de Nenbutu, sed neniam gajan ceremonion.

Kisiwada, Januaro 1937.

Nisida-Ryôya.

PREPARA CAPITRO

PRIJAPANA BUDHISMO KAJ HÔNEN

Budhismo estas dividita en du partoj: Suda kaj Norda. Tiu prosperis en Cejlono, Java, Sumatra, Burma, Pegu, Annam, Laos, Kambodia, Koĉinĉinujo kaj Siamo. Tiu ĉi floris en Nepalo, Sikkim, Bhotan, Tibeto, Ĉinujo, Mongolia, Tartario, Manĉoukuo, Koreujo kaj Japanujo. Tie ĝi progresis dum mil cent jaroj, t.e. de la sesa jarcento antaŭ Kristo ĝis la jaro 639. La Suda estas nomata Hinayana Budhismo aŭ Budhismo de Malgranda Veturilo, bazita sur la teksto de Pali-lingvo kaj la Norda estas nomata Mahayana Budhismo aŭ Budhismo de Granda Veturilo, bazita sur la teksto de sanskrita lingvo. Tamen tiu ĉi klasifiko sufiĉe ne klarigas realan fakton, ĉar ĉiu lando, pro ties historia, geografia, klimata kaj socia cirkonstancoj, havas propran karakterizaĵon sur Budhismo.

En la jaro 552 (post Kristo), al japana Imperiestro Kinmei Budhismo estis prezentata, kun statuo de Budho kaj kelkaj sanktaj skriboj, de Seimei, reĝo de Kudara en Koreujo, kaj poste princo Syōtoku-Taisi (572-621), Imperiestra Regento, fariĝis la unua kredanto de Budhismo. Lia nomo estas famekonata en la historioj de japana Budhismo kaj japana kulturo, ĉar li estis tiu, kiu unuafoje akceptis la kontinentan kulturon. Konsekvence en Hakuō-periodo (662-709) Budhismo estis importata rekte el Ĉinujo. Tiamaniere preskaŭ ĉiuj sektoj kaj doktrinaj tipoj de ĉina Budhismo enradikiĝis en Japanujo.

Kelkaj karakterizaĵoj estas troveblaj en japana Budhismo. Unu el la karakterizaĵoj estas la daŭreco de ĝia evolucio. En Ĉinujo, kune kun la ŝanĝiĝo de dinastioj, Budhismo spertis nevolan agitadon, kiu ofte tranĉis la fadenon de ĝia evolucio kaj pereigis antikvajn formojn de tiu ĉi religio. Kontraŭe, japana Budhismo, kvankam ĝi ne estis libera de kadukaj epokoj kaj eĉ de partiaj persekutoj, superfluis super ĉiuj katastrofoj, ĉar la unue importitaj sektoj: Sanron, Hossō, Kegon, Tendai kaj Singon sektoj trovis subtenadon de Imperia familio kaj aristokratoj. Ili estis ne nur pioniroj de Budhismo, sed ankaŭ tiuj, kiuj adaptis Budhismon en la politikon, arton, moralon kaj studon de Japanujo. Laŭ statistiko, ĝis nun 38 Imperiestroj kaj ĉirkaŭ 400 geprincoj fariĝis Budhismaj pastroj kaj pastrinoj. Krom tio, novaj formoj de Budhismo: Zyōdo, Zen kaj Nitiren sektoj aperis kiel respondo al la spirita demando de la popolamaso. Sankta Hōnen ja ludis gravan rolon, kiel fondinto de Zyōdo-

sekto. Laŭ statistiko farita de japana departemento de religio, Jan. 1933, 17.595.436 kredantoj, 64.094 pastroj kaj 31.377 temploj apartenas al tiuj sektoj, kiuj devenis de Hônen kaj liaj disĉiploj. (Apartenantoj kaj la temploj de aliaj sektoj de Budhismo: 23.486.871 kredantoj, 94.997 pastroj kaj 46.866 temploj.)

Alia karakterizaĵo de japana Budhismo estas senbatalema. Oni ne povas trovi tian malpacan aferon, kian okazigis kristanoj en Bohemia, en 1618, kvankam japana Budhismo estas dividitaj en 13 sektoj kaj 56 subsektaj. Japanaj Budhanoj estas toleremaj eĉ por aliaj religioj; Ne estas malofte, ke Budhanoj provizas siajn templojn kaj monaĥejojn por Kristanaj kunvenoj kaj konferencoj. Kaj ankaŭ rilate al Sintoismo, kiu devenis de la propra festo de japana raso, Budhismo donis al ĝi teoriantan fundamenton, sed neniam malamikecon.

La nomo de Hônen estas konata en Japanujo, sed ne en la tuta mondo. Sed per tio neniu povas neglekti lian religion. Tie ankaŭ oni trovas lingvan problemon! Iuj opinias, ke Hônen estas la Martin Luther de Oriento. Pri tio oni povas konsenti nur de la vidpunkto de historia situacio.

Hônen ricevis de sinsekvaj Imperiestroj la plej honoran titolon "Daisi" (granda instruisto) ses foje: Enkô-Daisi (en 1702), Tôzen-Daisi, Edyô-Daisi, Kôkaku-Daisi, Zikyô-Daisi kaj Meisyô-Daisi (en 1905). Neniu alia Budhisma pastro krom Hônen ricevis tiom multfoje tiun honoran titolon. Sed pli grava ol la titolo estas tio, ke li venis teren el la Pura Lando. Foje iu disĉiplo demandis al li, ĉu li certe ĉi foje naskiĝos en la Pura Lando. Tiam Hônen respondis: "Mi certe revenos en la Pura Lando, ĉar de tie mi venis teren." Por fervoraj Budhanoj la fakto estas kredebla, ke Sinjoro Kristo venis teren el la Pura Lando, ĉar tiaj similaj faktoj troviĝas inter kelkaj sanktaj Budhanoj ne nur sur la historio, sed ankaŭ reale en hodiaŭa tempo civilizita.

Kompreneble ni ne estas blindaj por la grandeco de naturscienco, kiu plibonigas homan vivon de sia praktikeco kaj riĉigas homan racion de sia libera spirito. Sed ĉiu scienco havas specialan mondon limigitan de sia grundo kaj metodo, sekve tio ne povas esti taŭga por ĉio. Se oni staras ĉe naturscienca vidpunkto, la sanktaj skriboj de Ŝakamunio kaj Kristo, la poemoj de Tagore kaj Goethe devas esti nur vicoj de nigraj signoj, kaj la simfonio de Beethoven, Madonna de Raphaelo ankaŭ estas resonado de sonondo, kuniĝo de koloroj.

La problemo dependas ne de la konkludo, sed de la starpunkto. Oni scias, ke mikroskopo estas instrumento por vidi mikroorganismon, sed ne por vidi sunon. Sed tuj forgesinte tiun veron, per nudaj kaj raciaj okuloj ili obstine opinias, ke nenie estas Dio. Tio estas komprenebla, sed devas esti sensenca, ĉar ili forgesis la propran grundon kaj metodon de naturscienco. Konklude oni povas diri paradokse, ke la kompreniĝado pri religio komenciĝus de vera esploro de naturscienco.

LA VIVO DE SANKTA HÔNEN

1. LIA NASKIĜO KAJ INFANAĜO

Hônen naskiĝis en la vilaĝo Inaoka, suda parto de la distrikto Kume, la provinco Mimasaka. La persona nomo de lia patro estis Tokikuni¹, kaj la propra familia nomo de lia patrino estis Hada². Ĉar ili longe ne havis infanon, ili fervore preĝis al dio kaj Budho³, kaj ilia preĝo tre ĝojige estis respondata per naskiĝo de infano la sepan de Aprilo de la dua jaro de Tyôsyô (1133) dum la regado de Imperiestro Sutoku. Kiam la infano naskiĝis, purpura nubo aperis en la ĉielo, kaj du blankaj standardoj alflugis al la fruktoplenaj branĉoj de altega arbo Muku⁴ kun duopaj trunkoj ĉe la okcidenta flanko de ilia domo. Sonoriloj alligitaj al la standardoj sonoris en la ĉielo kaj la desegnaĵoj brilis hele kun multaj koloroj en la sunradioj. Post unu semajno, tamen, la standardoj supreniris en la ĉielon kaj malaperis. Oni konstruis tie ĉi ĉe lia naskiĝloko templon nomatan Tanzyôzi (naskiĝtemplo), kiu ekzistas ankoraŭ hodiaŭ. (en Inaoka-Minami-mura, Kume-gun, Okayama-ken).

La nove naskiĝinta infano estis nomata Seisi-maru⁵, kaj ne kiel aliaj infanoj li havis apartan kutimon sidi kontraŭ okcidento, kie la Pura Lando⁶ de Amida⁷ ekzistas.

Printempe en la sepa jaro de Hoen (1141), Gennai-Sadaakira, ĉefo de Inaoka, kiu sentis malamikecon kontraŭ Tokikuni, patro de Seisi-maru, atakis lin nokte. Tiam Seisi-maru estis naŭjara; li rimarkis la okazaĵon tra porda aperturo kaj arkpafis per malgranda sago rekte al la mezo de la frunto de tiu viro kaj vundis lin. Sadaakira forkuris pro timo de la malkovro de sia atako.

Tokikuni estis fatale vundita, kaj kiam la lasta horo de lia vivo proksimiĝis, li venigis sian filon Seisi-maru al la mortolito kaj rakontis al li, ke lia malbona fato estis antaŭdecidita de lia pasinta agado, kaj se la knabo intencus venĝi la patron al li, tio estus senfine daŭrigota. "Tial", diris lia patro, "forlasu tuj tiun ĉi laikan vivon kaj fariĝu Ŝramano⁸, por ke vi eniru en la Nirvanon⁹." Tiel parolinte Tokikuni faris sian lastan elspiron.

Oni povas vidi, ke Tokikuni kredis, ke lia tragika morto estis la rezulto de peko en lia pasinta vivo, kaj malpermesis, ke la filo venĝu lin. Tamen oni konsideru, ke tiam estis la tempo de brava feŭdismo; venĝo estis rigardata kiel la floro de samuraja¹⁰ moralo. Ŝajnas al mi, ke en tempo kiam venĝo estis

devo, profunde signifa estas la fakto, ke la knabo fariĝis Ŝramano multe impresite de sia patra testamento malpermesanta venĝon.

Aliflanke, post la forkuro Sadaakira bedaŭris sian atakon, kaj fine realiĝis lia deziro de naskiĝo en la Puran Landon. Plie, oni diras, ke lia idaro fariĝis ankaŭ fervoraj rekomendantoj de Nenbutu¹¹.

2. VIVO EN MONAĤEJO KAJ SUPRENIRO

AL MONTO HIEI

Seisi-maru ne povis forgesi la testamenton de sia patro, kaj li iris al Kwangaku-tokugô de Bodaizi en Mimasaka, ĉar li estis juna frato de la patrino de Seisi-maru, kaj post konsultado li decidis komenci la studon de Budhismo. Kwangaku, tamen, konsiderante, ke Seisi-maru estas neordinara talenta knabo, deziris sendi lin al Monto Hiei¹², la centro de studo de tiu tempo, kie lia genio sufiĉe elmontriĝos, kaj rakontis la intencon al lia patrino, kiu, kiel kutime ĉe virino, ne povis respondi, venkite de la malĝojo de disiĝo. Vidante la patrinan malĝojon, la knabo Seisi-maru parolis al ŝi jene: "Patrino, mi devas danki pro tio, ke mi naskiĝis kiel homo. Ankoraŭ pli estas feliĉe, ke mi havas privilegion aŭskulti la instruon de Budho. Kiam ni reale sentas la malkonstantecon en vivado, ni devas elekti la vojon forĵeti la gloron de tiu ĉi sonĝ-mondo. Plie la testamento de mia patro sonas ankoraŭ en miaj oreloj. La vera kaj la sola vojo por montri dankemon al mia patrino estas atingi la Nirvanon kiel eble plej baldaŭ." Tiel li konsolis la koron de sia patrino, kaj fine ŝi donis malgraŭvole al li konsenton, sed ŝia vizaĝo estis superverŝita de larmoj sen ŝia volo.

Kwangaku sendis la knabon al Zihôbô-Genkô ĉe Nisinotani sur Monto Hiei. En la prezentaletoro al li Kwangaku skribis jene: "Mi sendas al vi figuron de Monzyu¹³." Monzyu estas Bodhisatvo¹⁴, kiu prezentas transcendan saĝon. Per tiu ĉi letero oni facile povas supozi, kian eksterordinaran talenton la knabo havis.

Tiel Seisi-maru atingis la ĉefurbon, dekkvinjara, en la dektria de Februaro en la tria jaro de Kyûan (1147). Survoje al la ĉefurbo, li renkontis Hudiwara-Tadamiti, la Regenton, kaj liajn sekvantojn. Seisi-maru deĉevaliĝinte respektis salutis la Regenton flanke de la vojo. Kiam Tadamiti vidis la knabon, li demandis la sekvanton plej proksiman al si, "Kiu estas tiu knabo?" Aŭdinte,

ke tiu knabo estas Seisi-maru el la provinco Mimasaka kaj ke li estas survoje al Monto Hiei por studi Budhismon, la Regento diris, "Tiu knabo havas strangan lumon en siaj okuloj; Li ne estas ordinara knabo."

Seisi-maru restis ĉe Genkô nur du monatojn, dum kiuj tiu ĉi trovis eksterordinaran talenton de la knabo, kaj sendis lin al Kôen-azyari de Kurodani templo sur Monto Hiei la okan de Aprilo en la tria jaro de Kyûan (1147). Kôen estis granda klerulo kaj unu el la eminentuloj de Monto Hiei. En la oka de Novembro de la sama jaro li razis sian belan hartufon kaj fariĝis Budhisma pastro. Seisi-maru tiam jam havis deziron forlasi tiun ĉi mondon kaj ermitiĝi en arbaro. Aŭdinte la volon de la knabo, Kôen konsilis al li la efektivigon de lia deziro post la studo de Tendai sankta skribo. Seisi-maru obeis sian instruiston kaj studis dum tri jaroj.

3. LIA ELIRO KAJ SERĈADO POR SAVO

En la aĝo de dek ok jaroj, en la dekdua de Septembro en la sesa jaro de Kyûan (1150), Hônen forlasis la mastron kaj iris al Zigenbô-Eikû ĉe Kurodani sur Monto Hiei. Eikû ĝojis akcepti lin kaj dirante, ke li estas unu el Naturaj Sanktuloj, donis al li la pseŭdonimon Hônenbô, kiu signifas "Propra Ŝramano de Naturo¹⁵", kaj realan nomon Genkû.

Post lia foriro al Kurodani li tute ne zorgis pri deziroj kaj famo en tiu ĉi mondo, kaj enprofundiĝis en la studo de la sutroj¹⁶ dum ses jaroj. En la unua jaro de Hogen (1156), kiam li estis dudek-kvarjara, li forlasis Eikû kaj iris al templo Seiryôzi en Saga, kie li pasigis sep tagojn en serioza preĝo al Budho por esti montrata al li la vera vojo de savo. Plenuminte sep tagojn da preĝo, li iris al Nara, kie li renkontis Zôsyun-sôzu, grandan klerulon de Hossô-sekto, Kwanga-rissi de Sanron-sekto kaj Keiga de Kegon-sekto, kaj diskutis pri doktrinoj de Budhismo. Ĉiu el ili estis ege surprizita de la profunda scio kaj saĝeco de Hônen.

Lasu min paroli iomete pri la historio de tiu tempo. En la unua jaro de Hogen interne de la lando okazis milito. Post tri jaroj ankaŭ interne la milito de Heizi sekvis. La Imperiestro estis ekzilita; filo mortigis sian patron; membroj apartenantaj al la sama familio batalis unu kontraŭ la alia; moraleco perdiĝis, kaj la epoko pli kaj pli malsupreniris en abismon de senmoraleco kaj senlumeco. Kiel la epoko estis malluma, tiel la koro de Hônen estis en

mallumeco. Li ja estis unu el la plej grandaj kleruloj de la tempo, tamen li ankoraŭ havis ion ne plenumitan en sia koro.

4. LA FONDIĜO DE ZYÔDO-SEKTO

Dum naŭ jaroj li dediĉis sin tute al la studo kaj progresis pli ol iu. Kvankam granda estis lia erudicio, tamen li ĉagreniĝis pri la vojo de savo kaj sentis malkontentecon. Por eltrovi la veran vojon de savo, li legis la tutan kolekton¹⁷ de Budhismaj sanktaj skriboj kvinfoje, kaj fine trovis libron nomatan Ôzyôyôsyû¹⁸ de Esin, bazitan sur la komentario¹⁹ de Zendô²⁰. Li komencis esploron de tiu ĉi komentario. Li legis ĝin trifoje kaj fine trovis la sekvantan teksteron: "Ripetu tutkore la nomon de Amida. Ne ĉesigu la praktikon eĉ unu momenton, tute egale, ĉu vi estas piediranta aŭ staranta, sidanta aŭ kuŝanta. Tiu ĉi ago alportas savon sen iu escepto estante konforma al la originala sankta promeso²¹ de Amida." Kiam li legis tiun ĉi tekston, li venis al la konkludo, ke ordinaraĵoj, kiom ajn malproksime ili estas de la epoko de Ŝakamunio²², povas esti savataj tute egale, per la originala sankta promeso de Amida, kaj fine li forĵetis ĉiujn formalizaĵojn de religia disciplino kaj sinofaris tute al la praktiko de Nenbutu, kaj fondis Zyôdo-sekton²³, printempe en la kvina jaro de Syôan (1175) dum la regado de Imperiestro Takakura. Tiam li estis kvardek-trijara. Li fondis novan religion ne por edukitaj kaj saĝaj, sed por ordinaraĵoj kaj malkleraj homoj. Mi diras, "Por ordinaraĵoj kaj malkleraj homoj," sed kiom da homoj ne estas tiaj? Se ni provas kompari kun la granda universo niajn saĝecon kaj lernadon, kiom ajn profundaj ili estus, ni rimarkas, ke ni havas nenion por fieri pri tiuj. Laŭ tiu konsidero, ĉiu estas malklerulo kaj ni povas diri, ke Hônen fondis novan religion por ĉiuj homoj sen ia escepto. Tio ĉi estis ja grandega revolucio. La religio en tiama tempo estis tute aristokrata. Malriĉuloj ne povis esti savataj pro sia malriĉeco. Ne kiel aliaj revoluciuloj, li alportis tian grandan revolucion sen sangoverŝo. Tio ĉi vere devenas de lia nobla karaktero.

Sub tiaj cirkonstancoj li fondis novan religion kaj sin dediĉis sole al la praktiko de Nenbutu. Kaj tiel li forlasis Kurodani sur Monto Hiei kaj iris al Hirodani ĉe Nisiyama, Kioto, kaj baldaŭ al Yosimizu ĉe Higasiyama, kie li konstruis malgrandan kabanon kaj predikis la doktrinon de Zyôdo, kaj klarigis Nenbutu. Lia misia laboro pli kaj pli kreskis je fervoro kaj liaj sekvantoj duobligis kaj reduobligis de tago al tago. Poste li transloĝiĝis al

templo nomata Kawaraya ĉe Kamo (kie Syōkokuzi templo nun staras; la dato de lia tiea restado estas nekonata), al Komatudono, la malnova loĝejo de Taira-Sigemori ĉirkaŭ en la unua jaro de Genkyū (1204); al Katiodera²⁴ (post lia ekzilo) kaj laste al Ōtani. Ōtani ĉe Higasiyama estas la loko, kie li mortis, kaj tie nun staras Mieidō²⁵.

Hōnen iam diris, "Mi ripetas la nomon de Amida sesdek mil fojojn en la tago laŭ la instruado de Zendō de T'ang-dinastio (618-907) kaj rekomendo de Esin-sōzu. Nun mi estas sufiĉe maljuna, kaj la fino de mia vivo alproksimiĝas. Aldonante ankoraŭ dek mil fojojn, mi ripetadas Nenbutu sepdek mil fojojn en la tago." De tiam li pasigis tempon por Nenbutu ne nur en siaj dumtagaj horoj, sed ankaŭ en nokto, kaj eĉ kam li havis vizitanton, li simple mallaŭtigis sian voĉon iomete kaj daŭrigis sian praktikon.

Li diris plie, "Mi fondis Zyōdo-sekton pro tio, ke ordinaraĵoj povas naskiĝi en Hōdo²⁶ per la ripetado de Nenbutu. Ĉar aliaj sektoj de Budhismo ne permesas tion, mi fondis Zyōdo-sekton laŭ Zendō-komentario."

De kiam Hōnen atingis Samadhion²⁷, li legis librojn, sen kandelo, per lumo elfluanta el siaj okuloj, kaj kiam li praktikadas Nenbutu en mallumo, brila lumo elfluis el lia korpo kaj plenigis la spacon ĉirkaŭ li, kaj foje, kiam li fervore alvokadis la nomon de Amida, Amida kaj Seisi Bosatu²⁸ aperis. Tro multaj tiaj mirakloj okazis por ilin citi ĉi tie en tiu ĉi malgranda libro.

5. LA KONFIDO DE LA IMPERiestROJ AL HONEN

La profunda saĝeco kaj alta morala karaktero de Hōnen fariĝis vaste konataj. En la kvara jaro de Syōan (1174) li estis invitata de Eksimperiestro Gosirakawa²⁹ al Hōzyūzi palaco kaj tie Hōnen incis³⁰ lin en la sakramenton³¹ de la perfektaj reguloj de Unu Veturilo³² (tiu regulo troviĝas en Bonmō-sutro). Kiam li prelegis pri Ōzyōyōsyū kaj legis la paĝon, sur kiu skribiĝas, ke la instruado kaj praktiko de la principoj esencaj por naskiĝi en la Puran Landon estas simile al okuloj kaj piedoj por homoj en tiu ĉi degenerigita tempo, la Eksimperiestro profunde estis kortuŝata ĝis larmoj.

De Januaro de la tria jaro de Kenkyū (1192) la Eksimperiestro estis malsana kaj lia malsaneco de tago al tago pliiĝis. En la dudek-sesa de Februaro Hōnen honore vizitis la palacon kaj predikis al li pri Nenbutu. La dektrian de Marto la Eksimperiestro mortis, ripetante la nomon de Amida ĝis la plej lasta momento.

En la printempo de la kvina jaro de Syôan (1175) dum la regado de Imperiestro Takakura³³, Hônen estis invitata de Lia Majesto al la palaco kaj inicis lin en la perfektajn regulojn de Unu Veturilo. Tio estis ankaŭ en tiu tempo, ke ĉiuj kortegaj oficistoj kaj altrangaj sinjorinoj alprenis al si la saman sanktan promeson.

Hônen estis ankaŭ plurfoje invitata de Imperiestro Go-toba³⁴ kaj la Imperiestro alprenis al si la sanktan promeson de obeo al la perfektaj reguloj. Estis en tiu tempo, ke Zyôsai-Mon'in, juna fratino de Imperiestro kaj Syûmei-Mon'in, Imperiestrino, alprenis al si la saman sanktan promeson. Hônen tiam estis sesdek-kvinjara.

Krom ĉi tiuj altranguloj, riĉuloj kaj malriĉuloj, bonzoj³⁵ kaj laikoj, kiuj faris la sanktan promeson, estis sennombraj.

6. SENTRYAKUSYÛ

La plej eminenta el la kortegonobeloj havantaj ardan kredon en Hônena instruado estis Kanezane³⁶, kiu estis ankaŭ monata Noti-no-Hossyôzi-dono aŭ Tukinowadono. Kiam la palaco de Tukinowa estis konstruata, ĝi ekhavis alon nesimile al aliaj konstruaĵoj. Al la demando de iu, Kanezane respondis: "Tiu ĉi estos la restadejo de Hônen."

En la oka jaro de Kenkyu (1197) Hônen estis iomete malsana. Kanezane kiel plej fervora sekvento de Hônen, sentis maltrankvilecon pri tio, sed feliĉe Hônen baldaŭ resaniĝis. De la unua de Januaro en la naŭa jaro de Kenkyu (1198), Hônen sin enfermis en sia pajlotegita dometo kaj ne akceptis inviton. Kanezane sentis sin soleca kaj sendis Huziwara-Sigetune al li kun jena komizio: "Mi dum jaroj havis privilegion aŭskulti la instruon, koncerne al la doktrino de la Pura Lando, sed bedaŭrinde mi ne povas diri, ke mi plene komprenas la vojon. Se vi havos bonvolon skribi al mi kelkajn gravajn punktojn de la doktrino, mi utiligos tiun libron anstataŭ persona intervjuo kaj konservos ĝin kiel rememoraĵo de vi." Leginte la leteron Hônen baldaŭ venigis Anrakubô kaj Sinkwanbô, por ke ili notu dikton de la instruado, kaj tiun li nomis Sentyakusyû³⁷, kaj donacis ĝin al Kanezane. Kanezane tre plezure akceptis ĝin kiel libron, en kiu troviĝas fundamentaj principoj de Zyôdo-sekto. Kanezane deziris ne publikigi tiun libron antaŭ la morto de Hônen.

Kion do Sentyakusyû montras al ni?

Unue li konfesas, ke ĉiuj homoj havas Budhecon, sen escepto, sed tamen ankoraŭ hodiaŭ homoj senfine migradas en la cirklo de transmigrado de naskiĝo kaj morto, kio rezultas de tio, ke homoj ne volas sin apogi sur iu el la du superaj leĝoj: Syôdo³⁸ (Sankta vojo) kaj Zyôdo³⁹ (Pura Lando), kaj sekve ili ne estas benataj per savo. El la du leĝoj, tamen, Syôdo ja estas malfacila, kaj la agoj postulitaj staras kontraŭ homa naturo, tial nuntempaj homoj estantaj malproksime de la epoko de Ŝakamunio, ne povas esti savataj. Kontraŭe Zyôdo estas tre facila leĝo, per kiu ĉiuj homoj povas trovi la vojon de savo. Tial Hônen preferis la vojon Zyôdo ol Syôdo.

Amida-Budho elektis Nenbutu el ĉiuj aliaj. Ĝi estas la originala sankta promeso. Tie ĉi citante la psalmon de la originala sankta promeso en la unua volumo de Muryôzyukyô-sutro⁴⁰, li diras, ke Nenbutu superas absolute ĉiujn aliajn praktikojn, ĉar ĉiun virton Nenbutu enhavas en si. Se fari figuraĵojn de Budho aŭ konstrui templojn kaj pagodojn konformiĝus al la postulo de la originala sankta promeso, malriĉuloj ne povus havi esperon de savo. Se la originala sankta promeso postulus saĝecon kaj talenton, malsaĝuloj kaj malkleruloj ne povus esti savataj. Se ĝi devigus obeemon al la ordonoj kaj leĝo, por tiuj, kiuj rompis ilin kaj por tiuj, kiuj ne akceptis ilin, savo estus neatingebla. Tial, kiam antaŭ jararoj Amida Nyorai⁴¹ ankoraŭ estis Bodhisatvo nomata Hôzô⁴², li estis kortuŝita de kompato por savi ĉiujn estaĵojn ne per konstruado de temploj, pagodoj kaj farado de statuoj, sed per unu praktiko alvokanta Lian sanktan nomon. Tio estas la mallonga konturo de Sentyakusyû.

Ĉar, kiel mi jam menciis, Kanezane estis fervora kredanto de Hônen kaj en lia doktrino, kiam Hônen vizitis lin, li ĉiam malsuprenvenis ĉe paŝoŝtonon de la palaco kaj akceptis lin. Ĉiuj aliaj eminentuloj de alta rango imitis la manieron de Kanezane, la Regento. Por Hônen, demokrata sanktulo, tio estis ĝena kaj li decidis iri nenien plu, sed resti en sia ermitejo. Kanezane tre disiluziiĝis kaj poste li kutimiĝis inviti Hônen per la preteksto de malsano. Hônen ne povis rifuzi tian inviton kaj iradis al la palaco kiel antaŭe. Syôgyôbô, unu el la disĉiploj de Hônen, vidis tion kaj pensis en si, ke la majstro iras nur al Kanezane, rifuzante invitojn de aliaj homoj, kaj ke li ne havus senkulpigon, se iu kritikus Hônen partia pro tio, ke li distingas riĉulon de malriĉulo. Hônen rimarkis tion ĉi kaj diris al Syôgyôbô: "Mi havas nedisigeblan rilaton kun la princo Kanezane de nia estinta vivo."

7. AMANO-SIRÔ KAJ KUMAGAI-ZIRÔ-NAOZANE

En la provinco Kawati vivis malbonfama rabisto nomata Amano-Sirô. En sia maljunaĝo li fariĝis unu el la disĉiploj de Hônen kaj estis nomata Kyôamidabutu. Iun noktomezon li aŭdis Nenbutu, kiun Hônen praktikis tute sola, kaj li tuis, do Nenbutu tuj ĉesis.

Post kelkaj tagoj Kyôamidabutu iris en la ĉambron de Hônen kaj diris: "Tia homo, kia mi estas, ne havas rajton restadi en la ĉefurbo, kaj feliĉe mia samuraja amiko loĝas en la provinco Sagami, mi deziras viziti lin kaj restadi tie kelke da tempo. Ĉar mi jam estas sufiĉe maljuna, mi dubas, ĉu mi povos vidi vin ree en tiu ĉi vivo. Eĉ se profunda doktrino estus parolata de vi, mi, malklerulo, ne povus kompreni ĝin. Mi estos tre dankema, se vi povos diri al mi, kio certigas mian naskiĝon en la Puran Landon kaj mi volas restigi tiujn vortojn en mia koro kiel vian rememoraĵon de vi."

Hônen respondis jene:

"Antaŭ ĉio vi devas memori tion, ke troviĝas nenia eksterordinara, profunda doktrino en Nenbutu. Vi simple alvoku la nomon de Amida kun sincera koro, havante firman kredon en la originala sankta promeso de Amida. Vi eble memoras la noktomezon pasintan antaŭ kelkaj tagoj, kiam vi kaj mi estis tute solaj en la domo. Vi aŭdis mian Nenbutu, mi kredas. Ĝi estas tia Nenbutu, kia garantias la naskiĝon en la Puran Landon. Tiunokte mi praktikis Nenbutu kredante, ke neniuj aŭdas mian, tial ĝi estis Nenbutu sen afekto. Nenbutu praktikata por spektaklo estas bona al nenio. Antaŭ hundo kaj kato ni ne afektas, sed supozu, ke vi estas kun plenaĝulo, tiam vi verŝajne agas nenature. Tio estas senvalora. Nenbutu en la mezo de nokto, kiam neniuj ĉeestas, estas en akordo kun la koro de Amida."

Aŭskultinte ĉi tion Kyôamidabutu diris, "Se tio estas vera, mi ne alvokas la nomon de Amida en ĉeesto de aliaj homoj." Tiam Hônen avertis lin: "Tio estas malbona. Vi praktiku ĝin antaŭ ĉia persono kondiĉe, ke vi havas sinceran koron." Kyôamidabutu diris ankoraŭ, "Mi komprenis, tamen mi havas alian demandon: "Ĉu estas necese sidiĝi kiam mi alvokas la nomon de Amida en la mezo de nokto, kaj ĉu estas ankaŭ necese porti rozarion kaj vesti sin per benita skarpo?" Hônen respondis: "Oni povas praktiki Nenbutu dum piediranta, staranta, sidanta aŭ kuŝanta. Rozario kaj skarpo ne estas necese postulitaj. Nur unu grava kaj absolute necesa estas praktiki ĝin kun sincera koro."

Rilate al tio ĉi, la respondo de Hônen al sia disĉiplo Zensyô, min impresas multe. Iam Zensyô demandis lin, kiamaniere ni pasigu ĉiutagan vivon. Hônen respondis :-

"Ja etas pli bone, ke vi pasigu ĉiutagan vivon tiel, ke Nenbutu facile povas esti praktikata. Se oni trovas ion, kio malhelpas la praktikon de Nenbutu, oni liberigu sin de tio. Se via restado en unu loko ne estas favora al Nenbutu, komencu pilgrimadon. Se vi ne povas praktiki Nenbutu dum pilgrimado, restu ie. Se via laikeco ne estas konvena por ĝi, fariĝu bonzo. Se via bonzeco ne estas konvena por la praktiko, fariĝu laiko. Se vi ne povas praktiki ĝin sola, agu kun aliaj personoj. Se esti kun aliaj homoj rompas vian Nenbutu, faru sola. Se vi estas tro malsata por praktiki ĝin, dependu de iu por manĝi. Se vivo dependanta de iu ne estas bona por via Nenbutu-praktiko, laboru por nutraĵo kaj praktiku ĝin. Se via edzino kaj gefiloj helpas vian Nenbutu, tiam ili meritas dankon. Tamen se ili malhelpas vian praktikon de Nenbutu, ne edziĝu, ne havu infanon kaj ne posedu domon. Se saĝeco kaj riĉeco helpas vin, ili estas valoraj. Se ne, forĵetu ilin. Nome, kio ajn estu, se tio helpas vin por praktiki Nenbutu, ĝi estas sur la vojo de savo."

Por tiuj, kiuj konsideras regulojn kaj moralon kiel formalafiĝon, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj celas universalan amon ĉirkaŭprenante ĉiujn, kia evangelio tiuj vortoj estas! Tamen por tiuj maldiligentuloj, kiuj estas bruligataj de avareco kaj besta deziro, kia bona preteksto al ilia senmoraleco tio ĉi estas!

X X X X

Militisto nomata Zirô-Naozane⁴², kiu vivis ĉe Kumagai en la provinco Musasi, distingis sin en multaj bataloj kontraŭ Taira⁴⁴ klano. Tamen poste li ekindignis kontraŭ Yoritomo⁴⁵, sia estro kaj Syôgun⁴⁶ de tiu tempo, kaj fariĝis bonzo nomata Rensei. Iun tagon li vizitis Seikaku-hôin kaj demandis pri la problemo koncernanta al la estonta vivo. Tiam Seikaku diris, ke li vizitu Hônen pro tia problemo. Li iris al li tuj laŭ la konsilo, kaj demandis lin pri la vojo de savo. Tiam Hônen diris al li, "Kion mi nur rekomendas al vi, estas ripeti la nomon de Amida." Pri tio ĉi, je granda surprizo de Hônen, Naozane ekploris. Hônen demandis lin, kial li ploras, kaj Naozane respondis jene:- "En la batalkampo mi mortigis tre multajn homojn kaj mi atendis, ke vi ordonos al mi fortranĉi miajn kvar membrojn kaj morti por saviĝi. Tute kontraŭ mia atendo, vi simple diris, ke nura afero bezonata estas la alvokado de la nomo de Amida. Kiam mi aŭdis tion, mi estis tiel ĝoja, ke mi ne povis malhelpi ploradon."

De tiam Naozane fariĝis sincera kredanto de Hônena instruado. Iam, kiam Hônén vizitis Kanezane, Rensei volis iri kun li. Unue Hônén ne deziris kunpreni lin, sed post repensado li akceptis lin konsiderante, ke Rensei ofendiĝus pro la rifuzo, ĉar li estis sentima militisto. Rensei atendis sian majstron sur la ŝtona ŝtuparo de Kanezane-palaco.

Tuj poste Hônena prediko estis mallaŭte aŭdebla el la ĉambro. Do Rensei ekkriis, "Ah, kiel sensenca mondo ĉi tiu estas! En tia grandega domo mi ne povas aŭskulti la majstran predikon nur pro tio, ke mi estas sentaŭgulo."

Kanezane aŭdis tiujn plendvortojn en sia ĉambro kaj demandis Hônén, "Kiu li estas?" Hônén respondis, "Lia laiknomo estas Zirô-Naozane, kiu estis militisto en Kwantô ĝis la plej lasta tago. Li fariĝis laika bonzo antaŭ kelke da tagoj, prenante la nomon de Rensei." Tiam Kanezane diris, "Petu lin eniri." Hônén sciigis al li. Rensei sencere monie eniris kaj aŭskultis la predikon de Hônén. Tiuj nobeloj hazarde ĉeestantaj estis tre surprizitaj de lia naiva maniero.

Rensei tiel gardis la krudan manieron de Kwanto-militisto, sed samtempe li havis afablan karakteron kaj firman kredon. Li laŭvorte firmtenis la frazon de Zendô, kiu ordonas, ke kredanto de Nenbutu ne turnu sian dorson al la okcidento, kie ekzistas Amida. Kiam li iris al Kwantô de Kioto, tiama ĉefurbo, li selis kontraŭdirekte; la vizaĝo de la ĉevalo direktiĝas al oriento kaj li rajdis kun sia kapo okcidenten; tiel li vojaĝis.

8. DISKUTO ĈE OOHARA

Iam Kensin⁴⁷, vicepiskopo kaj ĉefbonzo de Tendai-sekto, sendis Sagamibô al Hônén pro intervjuo. Kiam Hônén sin trovis ĉe Sakamoto, malsupro de Monto Hiei, li sendis informon al Kensin, tial li malsuprenvenis de la monto por akcepti lin. Kensin demandis lin pri la vojo de savo kaj Hônén klarigis la doktrinon de Zyôdo. Kensin diris, "Al ordinaraj nuntempaj homoj estantaj malproksime de Ŝakamunio mankas la Tri lernadoj⁴⁸, kaj ankaŭ kvin malvirtaĵoj⁴⁹ (karakterizoj de ĉi tiu mondo dum kaj de la tempo Ŝakamunio) estas brulantaj. Kiel ni povas naskiĝi en la Puran Landon?" Hônén respondis, "Estas vere, ke oni malfacile povas fariĝi Budho, sed naskiĝi en la Puran Landon estas facile. Laŭ Dôsyaku⁵⁰ kaj Zendo, ordinara homo havanta konfuzitan koron povas naskiĝi en la Puran Landon per la forta potenco de Amida sankta promeso."

Poste, en la aŭtuno de la dua jaro de Bunzi (1186), Kensin-hôin invitis Hônen al Syôrin-in ĉe Oohara. Multaj granduloj apartenataj al aliaj sektoj de Budhismo ankaŭ estis invititaj je tiu okazo. Hônen iris tien akompanante Syunzyôbô-Tyôgen. Multaj eminentuloj sidis ĉirkaŭ Hônen kaj demandis al li multajn malfacilajn problemojn, sed li respondis ilin, kvazaŭ li tranĉus la Gordianan nodon, kaj daŭrigis diri, ke Syôdo (Sankta Vojo) kaj Zyôdo (Pura Lando) estas ambaŭ instruadoj de Ŝakamunio, kaj ke oni ne povas facile diri, kiu el la du estas pli bona, tamen en la lasta tempo, en kiu homoj estas mallertaj rilate al religia kapableco, li volis subteni Zyôdon. Aŭskultinte la parolon de Hônen, ĉiuj kleruloj kaj aliaj ĉeestantoj konvinkiĝis, kaj ili komencis alvoki la sanktan nomon de Amida laŭte dum tri tagnoktoj. Oni nomas ĉi tiun diskuton Oohara-dangi aŭ la diskuto ĉe Oohara.

9. PERSEKUTOJ EL NORDO KAJ SUDO

Tiel Hônena instruado influis ne nur kortegono-belojn, sed ankaŭ popolamason en la tuta Imperio. Sed inter liaj propraj disĉiploj estis kelkaj malsinceraj monaĥoj, kiuj misuzante la influon de sia majstro, insultis aliajn sektojn kaj diboĉis, kio kaŭzis la koleron de la bonzoj en la Suda ĉefurbo (Nara) kaj en la Norda Monto (Hiei), kaj en la unua jaro de Genkyû (1204) ili petis ĉefepiskopon Sinsyô akiri la Imperiestran ordonon pri malpermeso de la praktiko de Nenbutu. Aŭdinte ĉi tion, Hônen skribis ĵuron konsistantan el sep artikoloj kun subskriboj de okdek eminentaj disĉiploj, unue por kvietigi la koleron de la bonzoj kaj due por averti siajn disĉiplojn kontraŭ torditaj opinioj, kaj li prezentis ĝin al la ĉefepiskopo Sinsyô.

Jen la ĵuraro en sep artikoloj.

Al ĉiuj miaj disĉiploj kaj la bonzoj, kiuj praktikas Nenbutu, mi faras jenan deklaron.

1) Ne havante scion vi ne faru insultojn la principojn de Singon aŭ Tendai, aŭ malestimi aliajn Budhojn kaj Bodhisatvojn.

2) Malkleruloj ne disputu kun saĝuloj kaj kleruloj, kiuj diferencas de ili en la klarigo de religio.

3) Vi ne diru kun plendema kaj obstina koro al tiuj, kiuj havas diferencon kredon kaj praktikon, ke ili forĵetu siajn religiajn praktikojn, kaj vi ne ŝercu pri ili.

4) En la nomo de Nenbutu, pri kiu vi diras, ke ĝi postulas neniun regulon, vi ne kuraĝigu aliajn homojn sin fordoni en drinkado de sakeo⁵¹, manĝado de viando, aŭ seksa interrilato. Neniam diru al tiuj, kiuj diligente praktikas religian disciplinon, ke ili apartenas al tiel nomataj: "Anoj kun diversaj praktikoj⁵²" kaj ankaŭ ke kredantoj de Nenbutu ne bezonas timi pekon.

5) Malkleruloj, kiuj ne scias, kio estas bona aŭ malbona, perdante la vojon de la sanktaj instruadoj de sutroj kaj kontraŭante la opiniojn de la majstroj, ne insistu pri siaj opinioj, nek diskutu pri bagateloj, kiuj ne sole ŝancelas la kredon de malkleruloj, sed ankaŭ kaŭzas mokadon de kleruloj.

6) Kun via stulteco vi ne provu prediki pri la vojo, kaj instrui malklerajn bonzojn kaj laikojn, klarigante malbonajn doktrinojn malgraŭ senscio pri ĝusta leĝo.

7) Neniu propagandu malbonajn leĝojn kontraŭbudhajn per la vortoj, "tiel diris la majstroj."

La sepan de Novembro de la unua jaro de Genkyû.

La Ŝramano Genkû.

Kia sincera ĵuro ĉi tio estas, sen nuanco de aroganteco! Trajtoj de la nobla karaktero de Hônen aperas en ĝi.

Kanezane estis tre malĝoja pri tiu afero kaj sendis leteron al la ĉefepiskopo, ke Zyôdo-sekto neniam estas batalema. La bonzoj do silentis.

Kvankam la bonzoj de Monto Hiei trankviliĝis, sed kolero de la bonzoj de Kôhukuzi templo ankoraŭ ne trankviliĝis, kaj en Septembro de sekvanta jaro ili alpetis al la Imperiestro, por ke li severe punu Hônen kaj liajn disĉiplojn. La Imperiestro dekretis, ke tio estas farita nur de herezuloj inter la disĉiploj de Hônen kaj ne estas kulpo de Hônen mem. La bonzoj de Kôhukuzi templo kontentiĝis pro la deklaro kaj fariĝis pacaj.

10. HÔNEN EKZILITA

En la naŭa de Decembro, en la unua jaro de Ken'ei (1206) la Eksimperiestro Go-toba vizitis sanktejon sur Monto Kumano. Hazarde tiam Zyûren, Anraku kaj kelkaj aliaj disĉiploj de Hônen okazigis specialan servon por la praktiko de Nenbutu ĉe Sisigatani, Higasiyama, Kioto kaj kantadis la psalmon Rokuzi-

raisan⁵³ (psalmokanto konsistanta el ses ĉapitroj). Ĝi venigis multajn homojn, kiuj havis kredon aŭ intereson je la instruado de Hônen. Inter ili oni trovis du korteganinojn, kiuj sekrete aliĝis. Post la reveno de la Imperiestro en la ĉefurbon, iuj preparolis la kunvenon kaj kalumniis al li pri malbona konduto koncerne de la du korteganinoj. La Imperiestro tre koleris kaj sendis Zyûren kaj Anraku en malliberejon. La kompatinda Anraku estis ekzekutita ĉe Rokuzyô-gawara. La biografio de Anraku rakontas, ke antaŭ morto Anraku psalmokantis la sunmalleviĝantan himnon kaj ripetante la nomon de Amida kelkcent fojojn li mortis kviete.

Oni ne povis kvietigi la Imperiestran koleron eĉ per la morto de Anraku, kaj pro tio, ke ilia majstro havas respondecon por la disĉiploj, li nuligis la bonzecon kaj rangon de Hônen kaj sendis lin al Tosa por ekzilo. Lia sekularizita nomo estis Huzii-Motohiko. Tio ĉi estis la dudek-okan de Februaro en la dua jaro de Ken'ei (1207.)

La disĉiploj kaj sekvantoj de Hônen tre ĉagreniĝis. Hôrenbô, unu el la disĉiploj, precipe estis malĝoja pro la ekzilado de sia majstro kaj diris la li, "Nia tre estimata majstro, vi jam estas maljuna, tial ni dubas kaj timas, ĉu vi povos iri sekure al la malproksima ekzilejo. Krome, kiel ni povas resti en la ĉefurbo post la ekzilo de nia majstro. Anraku jam estis kondamnata al morto, tial en la animo ni pensas, ke sola afero, kiu ĝenas la Imperiestron, estas nur la praktiko de Nenbutu. Se vi anoncus al la Imperiestro, ke vi plu ne daŭrigos la praktikon, la Imperiestra kolero eble malfortiĝus. Ĉu vi ne povas ĉesigi vian propagandon de Nenbutu nur ĝis tiam, kiam vi povos proklami ĝin sen ia timo de puno?" Ĉiuj aliaj disĉiploj ĉeestantaj konsentis tiun ĉi proponon.

Hônen respondis:- "Estas vere, ke mi estas preskaŭ okdekjara. Sed, ĉu vi ne scias, ke ĉiuj el ni devas sperti pli aŭ malpli frue ĉagrenan adiaŭon spite nian feliĉigan amikecon ĉi tie? Kie ajn ni aparte vivas, nia revido en la Pura Lando jam estas garantiata. Eĉ se nia surtera vivo iĝas dolora, ni devas pluvivi. Eĉ kiam vivo estas la plej kara por ni, morto venos. Ne estas grave, ĉu ni vivu kune, aŭ aparte mejlojn for. Krom tio, ĝis nun mi ne havis okazon prediki al kamparanoj, ĉar mi longe restadis en la ĉefurbo. Nun per la ordono venas al mi malofta bonega ŝanco disvastigi Nenbutu en la malproksima distrikto. Mi danku tiun suverenan favoron."

Aŭskultinte ĉi tion, Saiamidabutu, sidanta apud Hônen, diris, "Tiamaniere vi ne volas respondi al viaj disĉiploj." Kaj li turnis sin al la kamaradoj kaj diris, ke ili ne interkonsentu kun Hônen. Tiam Hônen diris al li, "Ĉu vi legis la sutron? Ĉu vi scias, kion ĝi diras?" Saiamidabutu diris, "Jes, certe, sed

kiamaniere ni povas toleri tion?" Hônen solene respondis, "Mi neniam forĵetas mian solan praktikon de Nenbutu, eĉ se tio signifus mian morton." Liaj disĉiploj verŝis larmojn de emocio.

Dume por konduki lin al la ekzilejo la arestisto kaj kelkaj aliaj venis en lian loĝejon kaj petegis lin rapidigi, tial Hônen forlasis la ĉefurbon. Kanezane ege bedaŭris lian foriron kaj sukcesis pasigi nokton kun li ĉe malgranda templo en Hosyôzi. Hônen tute ne zorgis pri sia ekzilo, sed la malĝojo de Kanezane estis netolerebla, kaj li bedaŭris, ke li ne povis trankviligi la koleron de la Imperiestro eĉ per sia bonega situacio kiel Regento de la Imperio. Tamen li promesis klopodi por peti la pardonon al la Imperiestro en la plej bona ŝanco, ĉar li timis, ke tro frua peto kaŭzus pli da kolero.

La deksekan de Marto Hônen forlasis la templon Hosyôzi. Tiam Zyôamidabutu, samurajo el Kakuhari, Sinano provinco, portis la palankenon de Hônen kun siaj sesdek sekvantoj. Ankaŭ sesdek el liaj disĉiploj sekvis Hônen. Hônen ĉiam iris piede en pajlosandaloj, sed ne per veturiloj; nek per ĉevalraĵdo, nek per palankeno. Tamen ĉi foje la disĉiploj sentis maltrankvilon pro lia maljuneco kaj malproksimenirado, tial ili provizis al li la palankenon.

Nu, Kanezane pensis, ke Tosa estas tro malproksima por sendi Hônen tien, kaj li private klopodis ŝanĝi la ekzilejon al Sanuki, sia bieno.

Hônen enboatiĝis ĉe la suda pordego de Toba (apud la hodiaŭa Itinenzi templo Simo-toba). Kiam li alvenis en Kyô-no-sima, Settu, miloj da homoj, junaj kaj maljunaj, bonvenigis lin kaj konvertiĝis.

Kiam Hônen atingis Takasago-n en la provinco Harima, li renkontis maljunan fiŝkaptistinon kaj li predikis por ŝi. Kiam li alvenis en Muro-notomari en la sama provinco, strata virino venis vidi lin kaj demandis pri la vojo de savo. Hônen kompatis ŝin kaj diris, "Tia vivo, kia estas via, havas multe da peko, kaj la punoj estas vere nekalkuleblaj. Se vi povos trovi alian vivtenadon, vi tuj forĵetu nunan profesion. Se ne, kaj se vi havas kredon, alvoku la nomon de Amida en via nuna situacio. Amida kompatas pekulinon el ĉiuj estaĵoj." Tiu afabla instruo de Hônen donis al ŝi grandan emocion, kaj ŝi fariĝis tre fervora kredantino sub lia influo.

La dudek-sekan de Marto Hônen atingis la loĝejon de Sainin, laika monaĥo kaj ĉefo de la regiono Siaku en la provinco Sanuki. Sainin tre ĝoje akceptis lin per la plej bona gastigo. Hônen parolis al li detale pri la savo per la alvokado de la sankta nomo de Amida. Baldaŭ poste Hônen adiaŭis Sainin kaj iris al Syôhukuzi templo de Komatu en la sama provinco, kie li restis dum kelkaj

tagoj kaj parolis al homoj pri doloraj surteraj vivoj kaj rekomendis Nenbutu. Tiel, multe da loĝantoj, junaj kaj maljunaj, riĉaj kaj malriĉaj, venis sub lian influon.

Post la ekziliĝo de Hônen Kanezane havis tian malĝojon pri lia foresto, ke li fine malsaniĝis, kaj pli kaj pli malfortiĝis precipe pro plurtaga fastado. Eksciante, ke lia vivo alproksimiĝis al la fino, li venigis Huziwara-Mitituka, ŝtatan konsilanton de mezklaso, en sian dormĉambron kaj diris al li, "Mi tre bedaŭras, ke mi ne havis eblon certigi la Imperiestran bonvolon al Hônen. Tamen tio estis neevitebla. Kiam ajn vi havos ŝancon, bonvole petu la Imperiestran pardonon por Hônen, kaj subtenu lian revenon al la ĉefurbo. Tio ĉi estas mia sincera kaj lasta dezirego en mia vivo." Kanezane mortis la dekan de Aprilo en la dua jaro de Ken'ei (1207). Li estis kvindek-okjara. Tiel Hônen, la majstro ne havis okazon revidi en tiu ĉi surtera vivo sian amatan disĉiplon Kanezane en lia lasta momento. Malĝojega sorto pezas sur la du granduloj.

Mitutika, laŭ la dezirego de Kanezane, kelkajn fojojn petis la Imperiestran pardonon, sed liaj petoj estis vanaj. Tamen iam poste Lia Majesto havis tre strangan sonĝon, kaj krom tio Nakayama-Yorizane, ĉefministro, ofte disputis kun la Imperiestro, dirante, ke li eraras, ĉar Hônen iam estis instruisto de la tri Imperiestroj. Fine, tial la Imperiestro decidis pardonon al Hônen kaj la okan de Decembro en la unua jaro de Zyôgen (1207) li permesis al li reveni ja ne en la ĉefurbon, sed resti en najbaraj provincoj de la ĉefurbo, per la oficiala ordono. Liaj disĉiploj en kaj ĉirkaŭ la ĉefurbo ĝojegis, tamen samtempe multaj homoj en la ekzilejo tre bedaŭris la adiaŭon. Tiel reveno de Hônen kaŭzis jen ĝojon kaj jen malĝojon.

11. LIA RESTADO ĈE KATIODERA KAJ REVENO EN ĈEFURBON

Malgraŭ la pardono, li ne povis reveni en la ĉefurbon laŭ la ordono, tial li restis iom da tempo ĉe Osibe en la provinco Settu kaj baldaŭ transloĝiĝis al Katiodera templo en la sama provinco. Li konstruis pajltegitan dometon en la valo en la okcidento de la templo, kaj tie loĝis li.

Kvar jaroj pasis en izoliteco tie, sed al li ankoraŭ ne venis la permeso reveni en la floran ĉefurbon. Tiam okazis stranga afero; la Imperiestro nokte havis sonĝon, en kiu li vizitis Rengeôin, kie al li alproksimiĝis sanktulo, kiu diris, "Hônen estis religia instruisto, kiu inicis la lastajn Imperiestrojn Go-sirakawa

kaj Takakura en la perfektan Budhordonon. Sen konsidero pri tiu ĉi afero, vi sekularizis Hōnen kaj ekzilis lin, kio egalas al kvin pekoj⁵⁴ meritantaj morton al vi." Unue pro la sonĝo, due pro la petego je pardono de la anoj, la Imperiestro permesis lin reveni en la ĉefurbon, la deksepan de Novembro en la unua jaro de Kenryaku (1211). Hōnen, tial, forlasis Katiodera templon la dudekan de la sama monato kaj atingis la ĉefurbon.

Precipe Zitin estis tre ĝoja, ricevinte la informon de lia reveno kaj sendis senditon al li anoncanta, ke estas preta por li la templeto ĉe Ootani. Hōnen volonte akceptis lian inviton. Kiam Hōnen alvenis al Ootani, amaso da homoj, bonzoj kaj laikoj bonvenigis lin.... Oni kalkulis pli ol mil homojn, kiuj venis al la templeto en tiu nokto.

12. BONAĴ AŬGUROJ KAJ LIA MORTO

Li pasigis kelkajn tagojn sen apetito kaj fine li malsaniĝis la duan de Januaro en la dua jaro de Kenryaku (1212). De la dua tago li parolis pri nenio escepte pri la naskiĝo en la Puran Landon, kaj eĉ en dormo liaj lipoj moviĝis pro la ripetado de la nomo de Amida. De antaŭ kelkaj jaroj liaj oreloj kaj okuloj jam estis malakraj, kaj li ne povis aŭdi bone, nek vidi klare. Sed nun, ju pli lia morto proksimiĝis, des pli liaj sensoj vigliĝis, kio surprizis kaj mirigis la disĉiplojn.

Hōrenbō, unu el la disĉiploj, diris al Hōnen, bĉiuj famekonataj Ŝramanoj de antikvaj tempoj restigas al ni memorajn templojn, sed vi havas neniun. Kie ni konstruu iun kiel memoraĵon pri vi?" Hōnen respondis, "Se vi konstruos templon ĉe unu loko, mia instruado ne disvastiĝos universale. Oni povas trovi mian memoraĵon ĉie tra la Imperio, ĉar mi pasigis mian tutan vivon nur por la disvastigo de Nenbutu-praktiko. Kie ajn Nenbutu estas alvokata, tie ekzistas mia tuta memoraĵo, ĉu ĝi estas pajltegita dometo de malriĉa fiŝkaptisto, aŭ granda domo de riĉulo."

Je la horo de drako (8 a.t.) en la dek-unua tago, Hōnen sciigis al siaj disĉiploj, "Ripetu Nenbutu laŭte; Amida venis. Tiuj, kiuj alvokas la sanktan nomon de Amida, naskiĝos en la Puran Landon sen ia escepto."

Je la horo de serpento (10 a.t.) en la sama tago, kelkaj disĉiploj alportis statuon de Amida tri syaku⁵⁵ altan en lian ĉambron kaj metante ĝin dekstre de lia lito, ili demandis al li, "Ĉu vi povas vidi ĉi tiun statuon de Amida?" Hōnen montris per fingro al la ĉielo kaj demandis ilin, "Krom la statuo, tie ankaŭ

ekzistas Amida. Ĉu vi povus vidi tiun?" Kaj li daŭrigis sian parolon, "Jam de antaŭ ĉirkaŭ dekkvar jaroj mi havis privilegion oftege vidi la Puran Landon, verajn Budhojn kaj Bodhisatvojn, pro la merito de Nenbutu. Mi tenis sekrete tion kaj parolis al neniu pri ĝi, sed mia fino estas venonta, mi sciigas tion al vi."

Je la horo de serpento (10 a.t.) en la dudeka de la sama monato super lia ĉambro aperis purpura nuboj, kies centro estis kvinkolora rondnubo, kiu estis videbla eĉ por multaj homoj sur la strato. Tiam unu el la disĉiploj demandis Hōnen, "Oni trovas purpuran nubon super ĉi tiu domo. Ĉu tio signifas, ke via naskiĝo en la Puran Landon fine venis?" Hōnen respondis, "Jes vere! Mia naskiĝo en la Puran Landon devas esti por ĉiuj homoj. La aŭguroj aperis, por ke oni havu certan kredon en Nenbutu." La disĉiploj multe estis kortuŝataj.

De la dudektria de la monato li senĉese praktikis Nenbutu, laŭte, jen dum dounhoro, jen dum unu horo. Seikwanbō, unu el la disĉiploj, pensis, ke al lia majstro jam venas la fino, kaj li petis de li ian skribaĵon pri la plej grava kaj necesa por Nenbutu-praktiko. Hōnen plenumis lian peton kaj skribis Itimai-Kisyōmon⁵⁶ aŭ Unufolia Dogmo.

De la horo de koko (6 p.t.) en la dudek-kvara tago ĝis la horo de serpento (10 a.t.) de la dudek-kvina tago li praktikadis Nenbutu pli kaj pli laŭte. Kvin aŭ ses liaj disĉiploj helpis lin en la praktiko kun siaj voĉoj ĝis kiam ili laciĝis, sed Hōnen neniam ĉesis praktiki.

De la horo de ĉevalo (tagmezo) lia voĉo pli kaj pli malfortiĝis, intermetante laŭton de tempo al tempo. Li vestis sin per tiu naŭstriita benita kasaĵo (skarpo), kiu estis donacita de Zikaku Daisi⁵⁷, kaj kuŝis: kapon norde, vizaĝon okcidente; tiel li recitis la sekvantan paĝon de la sutro, "La lumo de Amida iluminas ĉiujn partojn de la universo kaj protektas tiujn, kiuj alvokas la sanktan nomon de Amida, kaj neniam forlasas ilin." Tiam li faris pace lastan spiron kvazaŭ li ekdormus. Oni diras, ke liaj lipoj kaj lango moviĝis pli ol dek fojojn eĉ post silentado. Lia vizaĝo estis freŝa, kvazaŭ li vivus, kaj delikate ridetus. Tio estis je tagmezo en la dudek-kvina tago de Januaro en la dua jaro de Kenryaku (1212) dum la regado de Imperiestro Zyuntoku. Li estis okdekjara. La klera kaj saĝa lumo jam malaperis. Ja estas kompreneble, ke viroj kaj virinoj el ĉiuj klasoj de la lando ploris pro lia morto.

13. LA TESTAMENTO DE HONEN

Kiam Hônen estis sesdek-sesjara, li skribis sian testamenton, kun dato de Aprilo en la naŭa jaro de Kenkyu. Ĉiuj vortoj en tiu instruo tuŝas nian koron.

Jen estas mallonge :-

1) Mi parolas tion ĉi al miaj disĉiploj kaj anoj. Post mia morto, vi ne vivu kune. Kune vivi similas al perfekta paco, sed povas facile okazi disputo. Vi ĉiuj vivu prefere en kvieta loko kaj unuope praktiku Nenbutu. Kiam vi volas okazigi por mi meson, tiam vi ne kverelu kolektiĝante ĉe unu loko. Mi ne rekomendas al vi tiajn bonagojn, kiaj estas la desegnado de Budha figuro aŭ kopiado de sutro, ĉar vi ĉiuj devas sin dediĉi nur al la praktiko de Nenbutu. Mi ĉiam praktikas nur Nenbutu por mi kaj ankaŭ por aliaj. Kial vi praktiku aliajn bonajn agojn post mia morto? Komencu ripeti Nenbutu tuj post mia morto, daŭrigante dum periodo de unu tago ĝis unu semajno. Tamen mi ne devigas vin praktiki Nenbutu daŭre dum la periodo de Tyûin (dum 49 tagoj post ies morto), ĉar la daŭra praktiko eble enuigos vin, sekve forprenos vian entuziasmon en estonteco.

2) Tra ĉiuj generacioj post ies morto kutimas okazi inter la postvivantoj la konflikto pri distribuo de lia mono. Oni vidas tion ne nur inter laikoj, sed ankaŭ inter bonzoj. Tia disputo estas malnobla eĉ inter laikoj, des pli inter bonzoj.

Hônen donis instrukcion detalan pri la objektoj, kiuj estu donataj al Sinkû, Kwansai kaj aliaj disĉiploj, por ke ili ne kverelu, kaj li diris laste, "Vi disĉiploj kaj anoj, vivu tiel harmonie, kiel lakto miksiĝas kun akvo, kaj kuraĝigu unu la alian, por ke via karaktero progresu. Tio ĉi estas la sola deziro, kiun mi havas."

Kiel antaŭe menciite, kiam Seikwanbô estis dek-trijara, li fariĝis disĉiplo de Hônen, kaj li sin direktis al li de la komenco ĝis la fino dum dek ok jaroj. Hônen tre amis lin. Kiam Hônen estis mortonta en sia lito, Seikwanbô petis de li skribaĵon, en kiu oni trovas la plej gravan dogmon. Hônen skribis la sekvantan Unufolian Dogmon:-

"La sola vojo de savo, kiun mi rekomendas al vi, estas nek tia meditado praktikita de ĉinaj kaj japanaj kleruloj, nek tia Nenbutu de tiuj, kiuj studis kaj tute komprenis la doktrinon. Ĝi estas nenio alia ol ripetado de la nomo de Amida sen nuanco de dubo por naskiĝi en la Puran Landon. La triaĵa preparo⁵⁸ de koro kaj la kvar praktikaj metodoj⁵⁹ estas bezonataj, sed tiuj ĉi estas enhavataj en la firma kredo rilate al la naskiĝo en la Puran Landon per la ripetado de Namuamidabu⁶⁰. Se mi klarigus pli profundan doktrinon, mi vanigus la kompaton de du adrataj Unuoj, Amida kaj Ŝakamunio, kaj estus

forigata de la sankta promeso de Amida. Tiuj, kiuj kredas la potencon de Nenbutu, kvankam ili klare komprenas tutan instruadon de Ŝakamunio, devas kondukti kiel simplanima homo, kiu ne povas legi unu literon, aŭ kiel malkleraj monaĥinoj kaj monaĥoj, kies kredoj estas tre simplaj. Ne agu kiel klerulo, sed fervore praktiku Nenbutu."

14. POST LIA MORTO

Oriente de la loĝejo de Hônen estis bela loko, kiu malfermiĝis al la okcidento. Iu ĝin posedis por uzi sian tombejon. Tamen tiu homo donacis ĝin al Hônen, kiam ĉi tiu revenis al Kioto, la malnova ĉefurbo. Kiam Hônen mortis, ili konstruis ĉi tie kapelojn kaj en ĝi enterigis lin en ŝtonan tombon. Oni rakontas multajn aŭgurojn koncerne al la kapelo. Nun la Tion-in⁶¹ templo staras ĉe tiu loko.

Antaŭ la morto, Hônen malpermesis konstrui memoran templon, sed rekomendis al la disĉiploj resti en solaj en kvieta loko por praktiki Nenbutu, kaj li diris, ke tio ĉi estas la vera vojo por montri dankemon. Malgraŭ tio, Hôrenbô konferencis kun aliaj disĉiploj kaj decidis okazigi krom Nenbutu-praktiko rememoran servon por la majstro dum Tyûin (dum 49 tagoj de post ies morto), laŭ la ĝenerala kutimo de la socio. La episkopo Kôin de Mii templo estis unu el la prezidantoj unu semajnaj. Kôin estis klerulo, kiu kontraŭis la instruon de Hônen antaŭ lia morto. Tamen li fine rimarkis sian miskomprenon kaj fariĝis unu el la anoj de Hônen.

Post la morto de Hônen Imperiestraj ordonoj ofte malpermesis la praktikon de Nenbutu; nome dum Kempo periodo (1213-1218) dum la regado de Imperiestro Zyuntoku, dum Zyô kaj Karoku periodoj (1222-1226) dum la regado de Imperiestro Go-hirokawa, kaj dum Tenpuku (1233) kaj Ennô periodoj (1239) dum la regado de Imperiestro Sizyô. Tamen tiuj severaj ordonoj estis tro malfortaj por esti obeataj, kaj la praktiko de Nenbutu disvastiĝis ĉie tra la Imperio.

Sur Monto Hiei vivis bonzo nomata Zyôsyô, kiu ĵaluzis la prosperon de Nenbutu. Li verkis libron nomatan Dansentyaku (kalumniante kontraŭ Sentyakusyû de Hônen) kaj sendis ĝian kopion al Ryûkan-rissi, unu el la disĉiploj de Hônen. Ryûkan responde verkis la libron nomatan Kensentyaku, kiu defendas la libron de la majstro, kaj diris, "La kalumnio de Zyôsyôbô estas tia, kia ŝtoneto ĵetita en mallumon; ĝi trafas nenion." Pri tio Zyôsyô koleris kaj

iniciatis aliajn bonzojn kaj petis la abaton de la monto, por ke Imperiestro severe punu Ryûkan, Kôsai kaj aliajn anojn de Nenbutu kaj ankaŭ ordonu detrui la tombon de Hônen ĉe Ootani.

La Imperiestro donis permeson de la detruo de la tombo, la dudek-duan de Junio de la tria jaro de Karoku (1227). Sanmon⁶² bonzoj de Monto Hiei iris al Ootani kaj komencis detrui la kapelon de Hônen. En tiu kriza momento Tokiuzi de Taira klano, kiu estis reprezentanto de Syôgun ĉe kortego en Rokuhara, rapide venis kun siaj anoj kaj diris, "Eĉ se tio estas Imperiestra ordono, neniuj povas efektiviĝi ĝin sen permeso de la militista registaro." Ĉar ili ne volis aŭdi lian proteston, Tokiuzi uzis sian glavon. Do la bonzoj forkuris kaj nokto venis.

En tiu nokto Hôrenbô, Kakuamidabutu kaj kelkaj aliaj iris al Ryôkwai, filo de Kanezane kaj episkopo de Myôkô-in templo kaj diris, "Nun ĉesas la atako, sed ankoraŭ restas alia danĝero, tial ni devas porti la kadavron de la majstro al la okcidenta ekstremo de la ĉefurbo. Ryôkwai konsentis kaj ili kaŝe portis la kadavron tien. Timante ian danĝeron sur vojo Rensyô⁶³, Sinsyô, Hôa, Dôhen, Saibutu kaj kelkaj aliaj, konataj batalintoj, protektis la kadavron. Sekreta estis la procesio, tamen pli ol mil kredantoj kuraĝe partoprenis kun larmoj en la okuloj.

Ili alvenis en Saga kaj tie ili metis la kadavron en sekretan lokon, reciproke promesante por teni tion en sekreto. Sed ĉar oni diris, ke Sanmon bonzoj ankoraŭ serĉas la kadavron, ili ree transloĝigis ĝin la dudek-okan de la monato en la domon de Raikôbô-Eikû de Kôryûzi templo. Tiel la jaro pasis.

Je tagiĝo de la dudek-kvina de Januaro de sekvanta jaro, t.e. la dua jaro de Antei (1228), ili fine decidis cindrigi la kadavron, alportinte ĝin al la domo de Kôa ĉe Aono, Nisiyama. Kolektinte la ostojn, ili enmetis ilin en urnon kaj lasis ĝin je la prizorgo de Kôa. Pli malfrue ili konstruis kapelon sur okcidenta monteto en la limoj de Nison-in templo kaj tie deponis la ostojn.

15. KONKLUDO

Nu, la biografio de Sankta Hônen venis al la fino. Mi scias, ke mi devus skribi pli multajn aferojn krom tiuj, kiujn mi skribis; Historia fono ekzemple estas necesa, kiu tamen malmulte estas trovebla en tiu ĉi libreto. Ankaŭ estus bone, se mi aldonus kelkajn ĉapitrojn pri la vivo kaj kredo de multaj disĉiploj kaj anoj de Hônen: nur kelkaj speciale interesaj nomoj de personoj kaj iliaj

vivoj estas prezentitaj ĉi tie. Kiam mi esploris longan vivon de 80 jaroj de Hônen, mi rimarkis la fakton, ke li estas "Demokrata Ŝramano". Ke sin nomis, "Malklerulo Hônenbô" aŭ "Hônenbô de dek malbonaj agoj⁶⁴" havas profundan signifon. Multaj bonzoj kaj laikoj respektis lin kiel plej grandan klerulon, sed li neniam estis fiera pri si mem. Certe tio devenas de lia nobla karaktero. Ke la unuan fojon li veturis per palankeno al ekzilejo, ke li kutime piediris en sandaloj, montras lian unikan individuecon. Li fondis Zyôdo-sekton bazitan sur kelkaj linioj en la komentario de Zendo. Kelkaj homoj pensus, ke tiu bazo estas tro infaneca kaj simpla. Sed oni pensu, ke la fondinto de la nova sekto estis neniu alia ol Hônen respektata kiel plej granda klerulo kaj saĝulo, kaj oni trovas signifon. Por liberigi sian animon homa lernado kaj saĝeco estas senvalora. Li konsilis al ni ĉiuj esti kiel simplanima homo, kiu ne povas legi unu simplan literon aŭ kiel simple kredemaj gemonahoj. Oni povas lin nomi prave, kvankam paradokse, "Grandan ordinaran Ŝramanon."

Alia karakterizaĵo estas, ke li influis diversajn homojn; Imperiestroj, Eksimperiestroj, Imperiestrinoj, Princmonahinoj, Regento, noblaj bonzoj, kortegaj nobeloj, samurajoj, komercistoj, strata virino, rabistoj, k.t.p. estis en liaj disĉiploj kaj anoj. En Budhismo oni havas tendencon rigardi virinojn malbone pro tio, ke ili ofte degenerigas virojn, sed tamen al li venis multaj virinoj por aŭskulti lian konsilon. En la biografio aŭtoritata kompilita de Imperiestra ordono "Tyokusyûgoden⁶⁵" troviĝas nomoj de multaj virinoj.

Paca kaj humila granda Ŝramano kun firma kredo! El tio jen granda trajto de Hônen elvenas. Profunda signifo estas trovebla en kvieta vivo, kiu konas neniun limon, tio estas eble tipa trajto de orienta civilizacio. De tiu vidpunkto ni povas nomi Hônen la reprezentanto de Oriento. Foje Hônen avertis siajn disĉiplojn, "Ne konstruu memoran templon", kaj diris ankoraŭ, "Kie ajn Nenbutu estas alvokata, tie ekzistas mia memoraĵo." Mi dubas, ĉu liaj anoj estas fidelaj al lia instruado. Ĉu lia spirito estas konservata kaj respektata en ĝia vera senco? Forgesi lian spiriton efektive estas la ŝtupo al detruigo kaj degenero de la sekto mem.

NOTOJ PRI PROPRAJ NOMOJ KAJ BUDHISMAJ TERMINOJ

Rimarko pri la prononco.

Japane: si, sya, zi, zya, du, ti, tya, di, dya, tu, ya, ô, û

Esperante: ŝi, ŝa, ĝi, ĝa, zu, ĉi, ĉa, ĝi, ĝa, cu, ja, oo, uu

Mallongigoj: sk. = sanskrite, jap = japane

1. **Tokikuni.** Lia familiano estis Uruma. Li estis Ooryôsi, ĉefpolicano de la distrikto Kume.
2. **Hada.** Laŭ biografio, en antikva tempo ŝia prapatro venis en Japanujon de Ĉinujo kaj naciianiĝis.
3. **Budho** (sk. Buddha; jap. Hotoke; Butu; 佛 aŭ 佛陀). Laŭlitere ĝi signifas Vervekiĝinton, aŭ tiun, kiu havas absolutan saĝon kaj amon. Ordinare oni komprenas Lin kiel Ŝakamunio-Budho, fondinton de Budhismo, kiu naskiĝis en Hindujo. Sed en Budhismo krom la historia Budho ekzistas sennombraj Budhoj: Amida-Budho, Dainiti-Budho, Birusyana-Budho, Yakusi-Budho k.t.p. Laŭ Sankta Bennei (1859-1920), ĉe la vidpunkto de ĉefa objekto de preĝo, laŭ historia, socia kaj persona progresgradoj ideo pri Budho (Dio) dividiĝas en tri klasojn: 1) Ĉe monoteismo oni kredas nur unu Dion (Budhon), kiu ekzistas en la ĉielo, kaj ne rimarkas ekziston de dieco (Budheco) en la universo kreita, sed rimarkas nur sanktan spiriton, kiun fervoraj preĝantoj ricevas sur sin. 2) Ĉe panteismo ĉiuj estaĵoj havas diecon (Budhecon), tial ĉiuj povas fariĝi Budhoj (Dioj), kiam la dieco (Budheco) floris, kaj ne rimarkas la superaĵon krom sia dieco (Budheco). 3) Ĉe transcenda-imanenta monoteisma panteismo (absoluta dialektika religio) oni kredas nur unu plej sanktan superaĵon (Dio aŭ Budho), kaj ankaŭ rimarkas, ke ĉiuj estaĵoj havas diecon (Budhecon), kiu venis el la superaĵo, kaj sekve povas fariĝi Budhoj (Dioj), kiam la dieco (Budheco) kreskis per helpo de la leĝo kaj amo de tiu absoluta superaĵo (Dio aŭ Budho). Tie ĉi oni estu atenta pri Budhoj, pri kiu oni ne prijuĝu ĉe la

vidpunkto de matematiko. Tio apartenas ankaŭ al filozofia problemo, ke monoteisma vidpunkto staras ĉe transcenda (Platonismo) kaj panteisma vidpunkto staras ĉe imanenta (Aristotelesismo), kaj kiamaniere oni povas sintezi la du vidpunktojn. (Vidu la notojn pri Amida-Budho kaj Sakamunio-Budho)

4. **Muku arbo.** *Aphananthe aspera*.
5. **Seisi-maru.** Alia nomo estas Koyatigo,
6. **Pura Lando.** (sk. sukhavati; jap. Gokuraku aŭ Kiyoki Mikuni; 極樂國土) — Altgrada dimensia mondo, aŭ la mondo de absoluta nenio, el kiu ĉio aperas. Ĉe la sutro Amida-kyô, la Pura Lando ekzistas, en okcidento tre malproksima. Ĉe la sutro Kanmuryôzyu-kyô, la Pura Lando ekzistas proksime de tie ĉi. Ĉe la sutro Kongyô-kyô, la Pura Lando ne ekzistas, sed ekzistas absoluta nenio. Tamen tiuj tri devas esti tute veraj, ĉar Budho predikis al homoj laŭ ilia individueco en la formoj de mitologio, religio kaj filozofio. La Pura Lando, pri kiu Budhismo klarigas, ne estas geografia, nek astronomia, nek ideologia, sed reala ekzistado, ĉar se ni vidas la universon per nudaj kaj raciaj okuloj, tiam nenie sin trovas la Pura Lando, kaj se la Pura Lando estus individua ideologia produktaĵo, ĝi estus iluzia. Laŭ Sankta Bennei (1859-1920), ni vivas en la granda universo, kiu estas senlima tempe kaj space, krom kiu nenia universo sin trovas. Sed ĉiu estaĵo havas sian propran senton kaj ideon, per kiuj ĉiu vidas diversmaniere la universon: Ekzemple homo kaj insekto vivas en la sama universo, sed ekkonata universo ne povus esti sama. Pri tio Budhismo klarigas per kvin okuloj (jap. Gogen; 五眼) 1). Kvin sentorganoj, (sk. māṃṣā-cakṣuṣ; jap. Nikugen; 肉眼), per kiuj oni povas vidi kaj koni la naturan fenomenon de la universo. 2). Kvin senperaj naturvidpovoj (sk. dirya-cakṣuṣ; jap. Tengen; 天眼), per kiuj oni povas vidi kaj senti intuicie ion, kio okazas en la natura universo, uniĝante kun natura leĝo kaj spirito. (Surtera miraklo apartenas al tiu ĉi funkcio). 3). Super-natura saĝokulo (sk. prajñā-cakṣuṣ, jap. Egen; 慧眼), kiu intuicie eniras en la substancon de la universo, en la mondon de absoluta nenio (la Nirvana mondo). 4). Supernatura amokulo (sk. dharma-cakṣuṣ, jap. Hôgen; 法眼), per kiu oni povas vidi ne objekte, nek subjektive la Puran Landon, kies ejo estas la absoluta nenio, el kiu ĉio aperas. 5) Budha okulo (sk. buddha-cakṣuṣ, jap. Butsu-gen; 佛眼), kiu ne sole sintezas la supernaturan saĝokulon kaj amokulon, sed ankaŭ povas vidi kaj scii ĉion, kio okazas en la granda universo. Ĉe doktrino de Hônen, tiuj, kiuj kore

kredas kaj deziras naskiĝi en la Puran Landon, alvokante la sanktan nomon de Amida, povas havi privilegion eniri en la Puran Landon, ne demandante tempon kaj spacon, nek historian kaj socian regulojn. Ĝenerale en Budhismo oni ne ĉiam bezonas atendi sian morton por eniri en la Puran Landon aŭ la Nirvanon. Iam Hōnen parolis al sia disĉiplo: "Jam de antaŭ ĉirkaŭ dek kvar jaroj mi havis privilegion oftege vidi la Puran Landon, verajn Budhojn kaj Bodhisatvojn, pro la merito de Nenbutu. Mi tenis sekrete tion kaj parolis al neniu pri ĝi, sed ĉar mia fino estas venonta, mi sciigas tion al vi." Oni estu atenta pri la Pura Lando, ke ĝi havas nedisigeblan rilaton kun Budho, precipe Amida-Budho; en Budhismo, kie ajn Budho estas, tie ekzistas ĝia lando. (Vidu la notojn pri Hōdo kaj Amida-Budho.)

7. **Amida** aŭ Amida-Budho; 阿彌陀佛 (aŭ Amida-butu aŭ Oomioya). Tiu ĉi estas japana prononco de sanskrita lingvo amitāyus (senlima vivo) aŭ amitābha (senlima lumo). En religia signifo (ne filozofia) Amida estas la plej sanktulo, potenculo kaj eternulo. Laŭ Sankta Bennei (1859-1920), Amida estas dividita en tri partojn: 1) Hossin; 法身 (sk. dharma-kāya); Patrino Naskanto, kiu objekte estas la principo de kaŭzeco, de kiu ĉiuj estaĵoj de la universo ekzistas, kaj subjektive estas evoluo, kiu devenas de siaj du atributoj: ĉioscio kaj ĉiopovo, kiuj konstante kaj orde naskas, formas, detruas kaj senigas ĉiujn estaĵojn de la universo. 2) Hōsin; 報身 (sk. saṃbhoga-kāya); Patrino Savanto, kiu savas per siaj lumoj de saĝo kaj amo tiujn, kiuj kore alvokas la sanktan nomon de Amida, por purigi pasiojn kaj disvolvi animon, kiujn homaro ricevis de Hossin. 3) Oozin; 應身 (sk. nirmāṇa-kāya); Patrino Instruanto, kiu venas teren el la Pura Lando (kie ekzistas Hōsin) por instrui la doktrinon de Amida. Ŝakamunio estis unu el la plej eminentaj Oozin. Tiuj tri Patrinoj ne estas apartaj, sed Triunuo. (Vidu la notojn pri Budho kaj la Pura Lando).
8. **Ŝramano** (sk. Śramaṇa; 沙門). Homo, kiu agas bonon, sed ne malbonon. Tiu vorto estas aplikita al vera pastro de Budhismo. (Vidu la 54 noton pri Bonzo).
9. **Nirvano** (sk. nirvāṇa; 涅槃). Sinonimo de Oozyō (Naskiĝi en la Puran Landon), laŭ Sankta Bennei (1859-1920). Budhismo celas la eniron en la Nirvanon, en kiu konstanta paco kaj eterna vivo ekzistas. La Nirvano dividiĝas en du partojn: Uyo-nehān (sk. sopadhīśesa-nirvāṇa; 有余涅槃) kaj Muyo-nehān (sk. nirupadhīśesa-nirvāṇa; 無余涅槃). La unua estas la stato de tiuj, kiuj jam eniras en la Nirvanon, sed ankoraŭ vivas en tiu ĉi

mondo. Kaj alia estas la stato de tiuj, kiuj perfekte eniras en la Nirvanon mense kaj korpe. En Budhismo ĉiuj enirintoj en la Nirvanon fariĝas Budhoj. (Vidu la notojn pri Budho kaj la Pura Lando.)

10. **Samurajo** (jap. Samurai).-militisto.
11. **Nenbutu** (sk. Buddhanusmṛti; 念佛). Sinonimo de Namuamidabu. Japane Nen; sanskrite smṛti signifas alpreni ion en la koron, aŭ fiksi kaj koncentrigi sian penson sur io. Butu estas japana prononco de sanskrita lingvo Buddha. Do ĝi signifas alpreni Budhon en sian koron, aŭ fiksi kaj koncentrigi sian penson sur Budho. En Budhismo oni trovas diversajn Nenbutu en sia praktiko. 1) Mediti pri la figuro, aŭ kompatu, aŭ amo de Budho, aŭ de Bodhisatvo. 2) Mediti pri la Pura Lando, aŭ pri la Nirvano. Sed ĉe la doktrino de Hōnen Nenbutu signifas la alvokadon de la nomo de Amida-Budho, kun sincera koro, por naskiĝi en la Pura Lando, kaj tiamaniere oni facile kaj bone povas koncentrigi sian penson sur Amida-Budho kaj ĝia lando. Ĉe la doktrino de Tinzei, la plej eminenta disĉiplo de Hōnen, Nenbutu signifas ne disigi Budhon de la koro, ĉe doktrino de Sankta Bennei (1859-1920), sin dediĉi al la sankta nomo de Amida. En japanujo oni praktikas Nenbutu, prononcante Namuamidabutu (aŭ Namuamidabu). (Vidu la notojn pri Namuamidabu kaj Amida-Budho).
12. **Monto Hiei** (aŭ Hieizan). Situacias proksime de urbo Kioto. En malnova epoko oni kalkulis pli ol 3.000 templojn sur la monto, sed hodiaŭ tre malmulte troviĝas.
13. **Monzyu** (sk. Manjuśrī; 文殊). Unu el du eminentaj Bodhisatvoj, kiuj ĉiam sekvas Ŝakamunion. Alia estas Hugen (sk. Samantabhadra; 普賢), kiu prezentas amon. Tiu rajdas sur leono maldekstre de Ŝakamunio, kaj tiu ĉi rajdas sur elefanto. (Vidu la noton pri Bodhisatvo).
14. **Bodhisatvo** (sk. Bodhisattva; jap. Bosatu 菩薩). Bodhi estas Budha vojo aŭ Vervekiĝo. Sattva signifas entuziasmon. Ĝi signifas tiun, kiu entuziasme faradas Budhismajn praktikojn por du celoj: fariĝi Budho (la marko 卐 signifas tion) kaj savi ĉiun estaĵon de la universo (la marko 卐 signifas ĉi tion). De tiu vidpunkto, Jesuo Kristo ankaŭ estis unu el Bodhisatvoj, se oni pensas Budhismon ne kiel unu ismon de religio, sed kiel Veron mem.
15. **Propra Ŝramano de Naturo**. Hōnen estis genia religiulo. Iam Hōnen diris: "Mi estas la enkorpiĝo de Bodhisatvo." (Vidu la noton pri Bodhisatvo.)
16. **Sutro** (sk. Sūtra;). Budhisma sankta skribo. (Vidu la noton pri la tuta kolekto de Budhismaj sanktaj skriboj.)

17. **Tuta kolekto** de Budhismaj sanktaj skriboj (sk. Tripitaka; jap. Sanzô; Daizôkyô; Issaikyô; Zôkyô; 大藏經; 一切經). Ĝi konsistas el tri partoj: Sûtra-pitaka, Vinaya-pitaka kaj Abhidharma-pitaka. Originala Tri-pitaka estas skribita en sanskrita lingvo. Poste ĝia traduko aperis en la lingvoj Pali, ĉina, mongola, tibeta, manĉuria kaj japana. Sûtra-pitaka enhavas la instruon kaj predikon de Ŝakamunio en la formoj de parolado kaj dialogo. En Vinaya-pitaka Ŝakamunio-Budho donas al siaj disĉiploj ordonojn, regulojn kaj moralajn instruojn. Troviĝas en Abhidharma-pitaka filozofiaj traktadoj kaj klarigoj, pri la dogmo koncerne al la sutroj, de la plej eminentaj Budhanoj en Hindujo, Ĉinujo kaj Japanujo. La plej tipa Tri-pitaka japane nomata Syukusatu-zôkyô (malgrandigita Tri-pitaka) havas 1916 fakojn en 8534 volumoj. Neniu alia religio krom Budhismo havas tiom multe da sanktaj skriboj.
18. **Oozyôyôsyû** (往生要集). Verkita de Esin (aŭ Gensin) en 985. Kolekto de principaj dogmoj pri la naskiĝo en la Pura Lando. Tipa dogmo pri Amidaismo antaŭ Hônen. (Vidu la notojn pri la Pura Lando kaj Amida.)
19. **Komentario de Zendo** (善導大師: 觀無量壽經). Ĝi konsistas el 4 volumoj. La unua estas la konturo de Meditada sutro. La dua estas la priskribo pri cirkonstanco kondukanta al la instruado de la sutro. La tria estas la klarigo de meditadoj pri la Pura Lando kaj ĝia loĝantaro. La kvara estas la klarigo de praktikaj metodoj por naskiĝi en la Pura Lando. Tiu paĝo, kiu alportis la lumon al Hônen, estis trovebla en tiu ĉi lasta volumo. Zendô, la Sanktulo, skribas laste en la kvara volumo, ke neniu povas modifi ĉi tiun doktrinon, ĉar Amida-Budho pruvis ĝin ĝusta. (Vidu la noton pri Zendô.)
20. **Zendô** (Ŝan-Tao; 善導大師 613-681). La plej eminenta patriarko de Nenbutu-sekto en Ĉinujo. Laŭ biografio, li naskiĝis en la vilaĝo Lin-tzu de Ĉing-cou-fu en Santung, Ĉinujo. Dum la periodo de Ĉen-kuan (627-649) li iris al Hsi-ho en Sansi, kie li ricevis instruon de Budhismo de Dôsyaku. Poste li skribis la fame konatan komenton de Meditada sutro, kaj kvar aliajn komentariojn pri la praktika regularo. Li kopiis centmil foje la sutron Amidakyô kaj ankaŭ desegnis 300 bildojn de belega kaj sankta lando de Amida. Iam Hônen diris: "Mia doktrino tute dependas de Zendô." Laŭ biografio, Hônen adoris Zendô kiel la enkorpiĝon de Amida-Budho. (Vidu la noton pri la komentario de Zendô.)
21. **Originala sankta promeso** de Amida (sk. Pūrvapraṇidhāna; jap. Hongan; 本願). Laŭsence, justeco de Amida. Tiu ĉi estas la fundamenta principo,

sur kiu Hōnena religio baziĝas. En la sutro Muryōzyukyō oni vidas 48 sanktajn promesojn de Amida. Ĉe doktrino de Hōnen, la plej grava el ili estas la 18-a: "Ĉiuj sentemaj estaĵoj de la universo, kiuj Min kredas, amas kaj volas naskiĝi en Mian Landon, per almenaŭ dekfojaj ripetadoj de Namuamidabu, certe povas naskiĝi en Mian Landon, escepte de kvin pekuloj meritantaj morton kaj kalumniantoj kontraŭ ĝusta leĝo." En vera senco ĝi estas la Vero de la universo, ĉar kredantoj estas savataj kaj ateistoj estas suferantaj. Tion Sankta Bennei (1859-1920) klarigas en vasta senco rilate kun Hossin (sk. Dharma-kāya), unu el Triunuo Amida: la sankta promeso de Amida havas potencon elekti laŭleĝe tiujn, kiuj estas taŭgaj por Lia volo; tio okazas ankaŭ en natura fenomeno de la universo kiel montras la teorio de organika evoluo trovita de Charles Darwin. Ne estas strange, ke Budhismo ne estas kontraŭa al Darwinismo. (Vidu la noton pri Amida.)

22. **Ŝakamunio** (sk. Śakyamuni; jap. Syakamuni; Syaka Nyorai; Syakabutu; Syakuson; 釋迦牟尼佛; 釋尊 B. C. 558-479). La vorto sk. Śaka estas la nomo de gento, kiu loĝis en Kapilavastu, Hindujo. La vorto sk. Muni signifas saĝon. Lia patro Suddhodana mahārājā estis la reĝo de Kapilavastu. Lia patrino Mahāmāyādevi naskis lin ĉe arbo Aśoka en la palaco Lumbini la 8-an de Aprilo. Post 7 tagoj de la nasko lia patrino mortis, kaj lia onklino Prajāpati, fratino de la reĝino Mahāmāyādevi, ĉefe zorgis pri li. Lia infanomo estis Sidhartha aŭ Gautama. Kiam li estis 19-jara, li edziĝis al sia kuzino Yaśodharā, filino de la reĝo de Koli, kaj poste Rahula naskiĝis. En la aĝo de 29 jaroj li sekrete foriris la palacon kaj ĝis sia 35-jara dum 6 jaroj li serĉis Veron apud Nairāñjanā-rivero ĉe granda montaro Himalajo. Fine li akiris absolutan saĝon de Budho (sk. Anutrasamyak-sambodhi) ĉe Bodhi-arbo (pippaldurum) en Buddha-gaya, tagiĝe la 8-an de Decembro. De tiam lia prediko komenciĝis. Oni diras, ke triono da loĝantaro de Hindujo havis honoron ricevi de Budho mem la evangelion. Fininte la predikon dum 45 jaroj li eniris en Mahanirvanon (grandanirvanon) ĉe Sala-arboj en Kusinagara, meznokte la 15-an de Februaro. Tiam li estis 80-jara. De la vidpunkto de antropologio li estis homo apartenanta al Ŝaka gento, sed de tia vidpunkto oni ĝuste ne povas kompreni lin. En vera senco li estis Budho, kiu venis teren el la Pura Lando. Li ofte diris: "Mi estas Dio."
23. **Zyōdo-sekto**. Post morto de Hōnen ĝi disiĝis en kelkajn subsektajn. Plej grandaj el ili estas Tinzei skolo (ortodoksa) kaj Sinran skolo (Zyōdosin-

sekto aŭ nova Zyôdo-sekto). Oni nomas ilin Nenbutu-sekto aŭ Amida-sekto.

24. **Katiodera templo.** Troviĝas proksime de urbo Oosaka; nun apartenas al Singon-sekto. Laŭ biografio, Zendô aperis tie ĉi por pravigi la doktrinon de Hônen la 21-an de Januaro en la kvara jaro de Zyôgen (1210).
25. **Mieido.** Ĉefkonstruaĵo ĉe templo Tion-in, ĉefa templo de Zyôdo-sekto. Tie sin trovas sankta statuo de Hônen.
26. **Hôdo** (報土). Reala Lando, sinonimo de la Pura Lando, kie ekzistas Amida kiel Hôsin (sk. Sambhoga-kaya). Laŭ la sutro Amidakyô, en la Pura Lando ekzistas nenio malbonaĵo, eĉ nenio nomo de malbono, kaj Budhoj, Bodhisatvoj kaj sanktuloj, eĉ birdoj kaj arboj kun belegaj kaj sanktaj lumoj predikas al ĝia loĝantaro. (Vidu la notojn pri la Pura Lando kaj la Nirvano.)
27. **Samadhio** (sk. Samādhi; jap. Sanmai; 三昧; 定). Koncentrigi sian menson sur io, aŭ perfekta haltigo de penso, aŭ nuligi diferencon inter subjekto kaj objekto. En Budhismo ĝi signifas koncentrigi sian menson sur Budho. Laŭ la sutro, en Budhismo troviĝas sennombraj Samadhioj, sed Nenbutu-zanmai (Nenbutu-Samadhio) estas reĝo de ĉiuj aliaj Samadhioj, ĉar ĉiuj Budhoj atingas Nirvanon nur per Nenbutu-zanmai, kiu estas la plej nobla kaj necesa metodo en la praktiko de Budhismo. Oni estu atenta pri tio, ke Nenbutu kaj Samadhio havas nedisigeblan rilation, ĉar Nenbutu ne estas nura ekzercado de la prononco Namuamidabu. Laŭ biografio, Hônen akiris Samadhion en la aĝo de 66 jaroj, Januaro de 1198. Tio devas esti pro la merito de Nenbutu. Laŭ Sankta Bennei, ĉiuj homoj havas eblon akiri Samadhion, ĉar ĉiuj havas Budhecon. (Vidu la notojn pri Nenbutu, Namuamidabu kaj Nirvano.)
28. **Seisi Bosatu** (sk. Mahasthāmaprāpta; 勢至菩薩). Unu el du altaj Bodhisatvoj (alia estas Kwannon (sk. Avalokiteśvara; 觀音菩薩), kiuj ĉiam sekvas Amida. Seisi dekstre, Kwannon maldekstre. Tiu montras saĝon kaj tiu ĉi montras amon. (Vidu la noton pri Bodhisatvo.)
29. **Go-sirakawa.** La 77-a japana Imperiestro.
30. **inici.** Laŭ Plena Vortaro, enkonduki iun en konon pri iu afero pli malpli sekreta. (religio, sekto, scienco k.t.p.)
31. **Sakramento.** Kompreneble ĝi ne estas Kristana, sed similas al ĝi.

32. **Perfektaj reguloj de Unu Veturilo** (一乘圓頓戒; 佛戒) . Lotus sutro simple klarigas pri Unu Veturilo (sk. Ekayana; jap. 一乘), kiu alportas ĉiun estaĵon al la perfekta mondo: "Ekzistas nur unu veturilo, nek du, nek tri." Tiu unu signifas tuton. La perfektaj reguloj konsistas el tri partoj (三聚淨戒): 1) Ĉesigi ĉiun malbonon. (攝律儀戒). 2) Fari ĉiun bonon (攝善法戒). 3) Savi ĉiun estaĵon (攝衆生戒). La dek fundamentaj (十重禁戒) kaj 48 malpli gravaj reguloj (四十八輕戒) pri kiu montras Bonmô sutro (sk. Brahmajala-sutra; 梵網菩薩戒經), tradukita ĉinen en du volumoj de plej talenta ĉina tradukisto Kumarajiva en 406, apartenas al la unua parto formale, sed esence reprezentas la tuton. Tiuj perfektaj reguloj estas konstitucio de la universo, tial ne nur homoj, sed ankaŭ ĉiuj estaĵoj devas obei al la leĝo, ĉar ĝi ne estas farita de homo, sed estas la Vero mem. Laŭ Sankta Bennei (1859-1920), tiuj perfektaj reguloj estas la mezurilo de kredo, spegulo de koro, kaj se kreskas nia animo de la praktiko de Nenbutu, la reguloj estas kun ni tute nature, sed neniam konscie. Hônen estis la 9-a heredanto de la reguloj sub la ortodokso de Zikaku Daisi. (Vidu la notojn pri dek malbonaj agoj kaj Nenbutu.)
33. **Takakura**. La 80-a japana Imperiestro.
34. **Go-toba**. La 82-a japana Imperiestro. Li estis tiu, kiu ekzilis Hônen. Sed kompatinde Li ankaŭ devis sperti la saman sorton en 1221 okaze de la enlanda milito.
35. **bonzo**. Budhisma pastro, sed la vorto ofte estas uzata en malŝatiga senco, same kiel la vorto "laiko."
36. **Kanezane** (1147-1207) -Ĉefministro de japana imperio dum la regadoj de 4 Imperiestroj.
37. **Sentyakusyû** (Detale: Sentyaku-Hongan-Nenbutu-syû; 選擇本願念佛集). Jap. Sentyaku signifas elekti, kaj syû estas kolekto aŭ verkaro. Hongan: la originala sankta promeso de Amida. Tiu ĉi verkaro konsistas el 16 ĉapitroj, en kiuj oni trovas ĉefajn punktojn el la tri fundamentaj sutroj de Zyôdo-sekto kaj el la komentario de Zendô, kaj ankaŭ de Esin. La verkaro komenciĝas de la fama vorto: "Plej necesa kaj sufiĉa praktiko por naskiĝi en la Puran Landon estas Nenbutu." La originala teksto estas konservata ĉe Rozanzi templo kiel nacia trezoro. La verkaro ne estas nura opinio de homo Hônen, sed sankta skribo de Bodhisatvo Hônen. (Vidu la notojn pri la originala sankta promeso de Amida kaj Nenbutu aŭ Namuamidabu.)

38. **Syôdô** (detale : Syôdômon; 聖道門). Ĉina granda Ŝramano Dôsyaku, instruanto de Zendô, klasifikis Budhismon en du pordojn: Syôdômon kaj Zyôdomon. Ambaŭ du havas saman celon fariĝi Budho, sed Syôdômon havas jenajn emojn: 1) Filozofia. 2) Panteisma. 3) Aristokrata. Kaj en la praktiko ĝi postulas tri lernadojn, per kiuj oni povas eniri en la Nirvanon en tiu ĉi mondo. (Vidu la notojn pri tri lernadoj kaj Zyôdomon.)
39. **Zyôdo** (detale: Zyôdomon; 淨土門). Unu el la du pordoj de Budhismo. Ĝi estas en kontrasto kun Syôdô: Religia, monoteisma, kaj demokrata estas la karakterizaĵoj de Zyôdomon, kiu postulas nenian regulon krom la praktiko de Nenbutu, per kiu oni povas fariĝi Budho post la naskiĝo en la Puran Landon. (Vidu la notojn pri Nenbutu kaj la Pura Lando.)
40. **Muryôzyukyô** (sk. Amitayus-sûtra; 無量壽經). Unu el la tri fundamentaj sutroj de Zyôdo, tradukita ĉinen en du volumoj de hinda Budhano Samghavarman en 252. En la unua volumo oni trovas la historion de Amida. En la dua la sutro instruas, ke tiuj, kiuj alvokas la sanktan nomon de Amida kun sincera koro, povas naskiĝi en la Puran Landon. (Vidu la notojn pri Amida kaj Nenbutu aŭ Namuamidabu.)
41. **Nyorai** (sk. Tathāgata; 如來). Unu el la titoloj donataj al ĉiu Budho: Amida Nyorai; Yakusi Nyorai; Syaka Nyorai. Sed la vorto Nyorai ofte estas uzata en sama senco kun Budho.
42. **Hôzô** (法藏). Laŭ Sankta Bennei, pri tiu Bodhisatvo Ŝakamunio predikis en la formo de mitologio, same kiel la ideo, ke la Pura Lando ekzistas en okcidento tre malproksima, por ke oni facile komprenu la devenon kaj ekzistadon de Amida-Budho. Profunda doktrino estas kaŝita tie. (Vidu la noton pri Amida.)
43. **Naozane** aŭ Kumagai-Naozane (1138-1207). Ĉefo de la distrikto Kumagai. Lia religia emocio komenciĝis je la okazo de la batalo Itinotani apud Kôbe en 1184, kie li nevole mortigis junan kaj belan militiston Atumori de Taira klano. Laŭ biografio, antaŭjuĝinte sian mortontan tagon de antaŭ kelkaj monatoj li pace mortis kun bonaj aŭguroj la 4-an de Septembro.
44. **Taira klano**. Unu el la plej prosperaj klanoj. Idaro de la 50-a japana Imperiestro Kanmu. Minamoto aŭ Genzi klano pereigis ilin ĉe la batalo Itinotani en 1184.
45. **Yoritomo** (Minamoto-Yoritomo). Reprezentanto de Genzi klano, idaro de la 56-a japana Imperiestro Seiwa. Ili ankaŭ estis pereigataj de Hôzyô klano en 1219.

46. **Syôgun.** Titolo de kanceliero en malnova Japanujo. Nuntempe la titolo estas aplikita al generalo kaj admiralo.
47. **Kensin** (1131-1192). Laŭ biografio, aŭskultinte la predikon de Hônen ĉe Oohara, li havis tiel grandan ĝojon, ke li saltis sur endoman sanktejon kaj laŭte alvokadis Nenbutu.
48. **Tri lernadoj** (sk. triśikṣāpadāni; jap. Sangaku; 三學). La vorto siksani signifas lernadon aŭ disciplinon, kiu kondukas al Nirvano. 1) Disciplino. (sk. adhisīla; jap. Kai; 戒). 2) Meditado. (sk. adhicitā aŭ samādhi; jap. Zyô; 定). 3) Pura saĝo (sk. adhiprojna ; jap. E; 慧). La enhavo de la tri lernadoj diferencas de la dogmoj kaj sektoj, sed konklude oni povas tiel diri: 1) Fari ĉiun bonon. 2) Mediti pri Budho. 3) Kreskigi sian puran saĝon. Ĉiuj necesaj praktikoj de Budhismo estas montrataj en la tri lernadoj. Tiel nomata Koperniksa ŝanĝo de Hônen dependas de tio, ke li anstataŭigis la formalon de la tri lernadoj per Nenbutu, kiu tamen esence enhavas la tri lernadojn. Laŭ Sankta Bennei, tiuj, kiuj sincere praktikadas Nenbutu, ne konscie, sed nature povas esti en tri lernadoj.
49. **Kvin malvirtaĵoj** (sk. panca-kasāyah; jap. 五濁). Stato de tiu ĉi mondo. 1) Kôdyoku (sk. kalpa-kasāyah; 劫濁): Ofte okazas katastrofoj, malsanoj kaj militoj. 2) Kendyoku (sk. Drṣṭi-kasāyah; 見濁) Malaperas ĝusta opinio kaj bona ideo. 3) Bonnôdyoku (sk. kleśa-kasāyah; 煩惱濁): Kreskas ĉagrenoj de avaro, kolero kaj senutila plendo. 4) Syuzyôdyoku (sk. sattva-kasāyah; 衆生濁): Foriĝas ĉiuj feliĉoj de homoj. 5) Myô-dyoku (sk. ayus-kasāyah; 命濁): Homa vivo mallongiĝas.
50. **Dôsyaku** (Tao-cho; 道綽禪師 562-645). Unu el kvin grandaj ĉinaj prapatroj de Zyôdomon. Instruisto de Zendô. Li naskiĝis en Ĉin-yang, Ping-cho, Ĉinujo. Anrakusyû estas famekonata verkaĵo.
51. **Sakeo.** japana alkoholaĵo.
52. **Anoj kun diversaj praktikoj** (雜行人). Tiuj anoj ne faras kvin ĝustajn praktikojn (五種正行) de Zyôdomon: 1) Dokuzyu-syôgyô (読誦正行): Legi tri fundamentaj sutroj de Zyôdo. 2) Kanzatu-syôgyô (觀察正行): Mediti pri Amida kaj la Pura Lando. 3) Raihai-syôgyô (禮拜正行): Fari riverencon al Amida kaj aliaj sanktuloj. 4) Syômyô-syôgyô (稱名正行): Alvokadi la nomon de Amida. 5) Sandan-kuyô-syôgyô (讚歎供養正行): Fari admiregon kaj meson al Amida kaj aliaj sanktuloj. Zendô kaj Hônen prefere rekomendis al ni la kvaran (alvokadi la nomon de Amida: Nenbutu.) el tiuj kvin ĝustaj praktikoj.

53. **Rokuziraisan** (aŭ Oozyôraisan; 六時禮讃; 往生禮讃). Psalmo por beni la naskiĝon en la Puran Landon, verkita de Zendô. Ĝi komenciĝas de sunmalleviĝanta himno kaj finiĝas je sunleviĝanta himno. Tiu psalmo ne nur havas grandvaloran religian vivon, sed ankaŭ bonegan stilon kun tipe orienta tono.
54. **Kvin pekoj** (sk. pancānantaryāni; jap. Gogyaku; 五逆). Laŭ Kussyaron, 1) Siĥu (sk. pitṛhāta; 殺父): mortigi sian patron. 2) Simo (sk. mātṛghāta; 殺母): mortigi sian patrinon. 3) Sirakan (sk. arhadvadhā; 殺羅漢): mortigi Araĥaton (sanktulo). 4) Sui-bussinketu (sk. tathāgata-syantike dusta citta rudhirot padana; 出佛身血): atenci la korpon de Budĥo. 5) Hawagôso (sk. samghadheda; 破和合僧): malordigi harmonion de samideanoj (bonzoj).
55. **syaku**. 1 metro estas 3.3 zyaku (syaku).
56. **Itimai-Kisyômon** (Unufolia Dogmo; 一枚起請文). Itimai = Unufolio. Kisyô = voto. mon signifas ĉi tie dogmon. Tiu ĉi estas konkludo de la religio de Hônen. En la fino de la dogmo oni trovas la aŭtentikigan subskribon: "La doktrino pri la praktiko de Zyôdo-sekto estas plene montrita en tiu ĉi dogmo." Neniu povas diri pri la dogmo, ke ĝi estas malkara kaj simpla, ĉar ĝi estas la konkludo de lia religio.
57. **Zikaku Daisi** (794-864). En 808 li iris al Monto Hiei kaj studis Tendai doktrinon sub la gvidado de Saityô. En 838 li iris en Ĉinuĵon kaj restis tie ĝis 847. Poste li fariĝis ĉefepiskopo de Tendai-sekto.
58. **Triaĵa preparo de koro** (jap. Sanzin; 三心). Laŭ Zendô kaj Hônen, oni devas havi triaĵan preparon de koro por naskiĝi en la Puran Landon. Jen: 1) Sizioŝin (至誠心): Kun sincera, pura kaj naiva koro oni devas fari riverencon (korpe), fari admiregon (voĉe) kaj koncentrigi sian menson sur Budĥoj. 2) Zinsin (深心): Kun profunda kaj firma kredo oni devas konfesi tiujn pekojn, kiujn ni sentas kaj scias en la koro, kaj kredi fortan savon de Budĥoj. 3) Ekôhotuganzin (回向發願心): Ĉion, kion ni faras, parolas kaj pensas, oni devas sin turni ne al la surteraj aferoj, sed al naskiĝo en la Puran Landon. Oni ne pensu ilin aparte, ĉar tiuj tri havas reciprokatan rilaton en la praktiko. Sankta Bennei klarigas tion en kredo, amo kaj volo.
59. **Kvar praktikaj metodoj** (jap. Sisyyu; 四修). Laŭ Zendô, 1) Kugyôzyu (恭敬修): Adori Amida kaj ĉiujn aliajn sanktulojn kaj ĝiajn figurojn. 2) Muyosyyu (無余修): Praktiki nenion krom la ripetado de Namuamidabu (Nenbutu). 3) Mukenzyu (無間修): Ne ĉesigi la praktikon de Nenbutu eĉ

unu momenton. 4) Tyôzisyu (長時修): Daŭrigi la praktikon de Nenbutu ĝis morto.

60. **Namuamidabu** (aŭ Namuamidabutu ; sk. Namo'mitabhaya Buddhaya aŭ Namo'mitayuse Buddhaya; 南無阿弥陀佛). La vorto Namu (sk. Namas) havas du signifojn: Unua estas, "Savu animon mian." kaj dua estas, "kreskigu mian animon." Tiu signifas, "Donu al mi la Lumon de eterna vivo." kaj tiu ĉi signifas, "Plenumu la Volon en mian animon, kiu jam estas en la Lumo." Amidabu estas Amida-Budho, Sankta Triunuo: Patrino Naskanto, Patrino Savanto kaj Patrino Instruanto. Kiel oni jam vidas en la noto pri Nenbutu, por koncentrigi sian penson sur Budho, t.e. por Nenbutu troviĝas multaj manieroj, sed laŭ la doktrino de Hônen, la alvokado de la nomo de Amida, t.e. la ripetado de Namuamidabu estas la plej bona kaj facila maniero por Nenbutu, t.e. sekve por atingi la finan celon de Budhismo. Efektive mediti pri io ne estas facila afero por homoj, tial la maniero devas esti plej simpla, kaj samtempe iel ajn ĉe religio la maniero devas esti plej alta kaj bona, ĉar se oni provas koncentrigi sian penson sur io per ripetado de a,b,c, aŭ 1,2,3, havante nenian celon, tiam tio estas simpla meĥanika ekzercado de medito. La praktiko de Nenbutu ne estas nura ekzercado de la prononco de Namuamidabu, nek nura ekzercado de medito. La problemo dependas de tio, por kio ni praktiku kaj kia estas ĉefa objekto, tial antaŭ ĉio oni devas decidi sian celon kaj objekton kaj poste praktikon. Ne sole ĉe religio, sed ankaŭ ĉe aliaj aferoj tiuj tri principoj estas bezonataj. Kaj dua demando estas: kio estas la plej alta celo, kio estas la plej valora objekto kaj kio estas la plej supera praktiko. Kiel oni vidas en la noto pri Budho, por la dua demando oni havas multajn respondojn laŭ sia historia, socia kaj individua progresgradoj. Tie ĉi ĉe Budhismo, precipe ĉe la religio de Hônen, plej alta celo estas naskiĝi en la Puran Landon, kie oni baldaŭ nature povas fariĝi Budho, kaj la plej varola objekto estas Amida-Budho, kaj la plej supera praktiko estas Nenbutu. Tiuj tri principoj kompreneble havas nedisigeblan rilaton, tial sen tiu celo kaj sen tiu objekto la praktiko de Nenbutu devas esti sensenca. Pro tio tiel nomata Triaĵa preparo de koro estas bezonata. Sed kiel Hônen diras en Itimai-Kisyômon, la firma kredo solvas ĉion. Kaj sen la alvokado de la sankta nomo de Amida oni ne povas facile mediti sur Amida-Budho, kio vere estas konkludo de Sankta Hônen, kaj krom tio la simpla praktiko de Nenbutu havas grandvaloron ne sole en reala rezulto, sed ankaŭ en la longa historio de Budhismo.

61. **Tion-in templo.** Ĉeftemplo de Zyôdo-sekto. Unu el la plej grandaj temploj en Japanujo.
62. **Sanmon.** Unu el du grandaj subsektaj de Tendai-sekto.
63. **Rensyô.** Utunomiya no Yasaburô-Yorituna, ĉefo de la distrikto Utunomiya. Li estis brava militisto same kiel Kumagai-Rensei. Kumagai kondukis lin en la instruadon de Hônen. Kun bonaj aŭguroj li pace mortis la 12-an de Novembro en 1259.
64. **Dek malbonaj agoj** (十惡). a) Korpe 1) mortigi. 2) ŝteli. 3) malĉasti. b) Parole. 4) babili. 5) flati. 6) mensogi. 7) insulti. c) Kore. 8) avari. 9) koleri. 10) antaŭjuĝi.
65. **Tyokusyûgoden** (勅修法然上人行狀畫圖). Ilustrita biografio de Hônen, kompilita de Imperiestra ordono, verkita de Syunzyô-hôin, desegnita de Tosa-Yosimitu kaj 6 eminentaj desegnistoj, antaŭ ĉirkaŭ 600 jaroj. Ĝi konsistas el 48 partoj. La originalo, kiu sin trovas ĉe Tion-in templo kiel nacia trezoro, estis kopiita de tiamaj tri Imperiestroj, princoj kaj kortegnobeloj.